



BELGA
ESPERANTISTO
MONATA REVUO

Fondita en 1908.

OFICIALA ORGANO DE LA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Aliĝinta al la Unuiĝo de la Belga Perioda Gazetaro

Fondintoj : L. CHAMPY, Fr. SCHOOFS, Am. VAN DER BIEST-ANDELHOF,
J. VAN LAERE, Oscar VAN SCHOOR.

Direktoro :

FRANS SCHOOFS, Kleine Hondstraat, 11
ANTVERPENO

Por la anoncoj oni sin turnu al :

H. PETIAU, St. Lievenslaan, 60, GENTO.

JARA ABONPREZO : Fr. 20,—

EKSTERLANDO : Belgoj 5.—

ANTVERPENO

1928

ENHAVO. — Danko al la L. K. K. — Oficiala Protokolo. — Sepa listo de Kongresanoj. — Pri prikongresaj plendoj. — Pentrinda Antverpeno : La Ŝipistkvartalo. — Belga Kroniko. — Gratuloj. — Nekrologo. — Ekzameno pri profesora kapableco. — La poŝto dum la 10^a kongreso. — Fotografioj pri la 20^a. — U.E.A. Belga Teritorio. — Por la filatelistoj. — Diversaj Informoj.

KIAL KOMPLIKI VIAN LABORON ?...

Konfesu ke

la transformo de vortoj en signojn", kaj poste
reprodukto de tiuj samaj "signoj" denove en vortojn

estas duobla laboro

kaj vi komprenos jam, kial la

DICTAPHONE

estas la senpera metodo por diktado de la korespondadoj.

Petu la broŝuron:

"L'HOMME D'AFFAIRES AU BUREAU"

(La aferisto en la oficejo)

— Senpaga alsendo —

ROBERT CLAESEN

Fako : ES

40, rue de Loxum,

BRUSELO.

Tel. : 106,82

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

Redakcia parto :

FRANS SCHOOFS
11, Kleine Hondstraat, Antwerpen
Telefono 543.74

Abonoj kaj Mensejoj :

FERN. MATHIEUX
94, Avenue Bel-Air, Uccle
Poŝtêko No 99984.

Konstantaj kunlaborantoj : M. JAUMOTTE, L. COGEN, W. DE SCHUTTER, S-ino L. FAES
H. PETIAU, F-ino R. SPIRA, F-ino J. VAN BOCKEL, J. VAN SCHOOR, H. VERMUYTEN.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

DANKO AL LA LOKA KONGRESA KOMITATO.

La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado sendis sekvantan leteron al la L. K.K. en Antverpeno:

Genève, 28an de Aŭgusto 1928.

LOKA KONGRESA KOMITATO de la
20a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO,
S-ro Fr. SCHOOFS, ĝen. sekretario,
11, Kleine Hondstraat, ANTVERPENO.

Tre estimataj, karaj samideanoj,

jam antaŭ ol la finlaboroj por la Dudeka estas faritaj, en la nomo de nia komitato kaj de la ĝenerala estraro de nia movado ni deziras tre kore danki al vi ĉiuj pro la bonega laboro, kiun vi faris por sukcesigi la kongreson de Antverpeno. Ĉiuj raportantoj konstatis, ke ĝi estis unika sukceso.

Rajte vi nun ripozos iomete post tia streĉa laboro. Sed ni kore esperas, ke la sukceso de l'kongreso donas al vi novan kuraĝon kaj plian fervoron, daŭrigi la batalon por la granda ideo, kies pioniroj vi estas. Por tio ni sendas al vi ĉiuj, kun nia profunda danko, niajn plej sincerajn bondezirojn.

Bonvolu kredi, tre estimataj, karaj samideanoj, al niaj plej sinceraj kaj samideanaj sentoj.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO

de la Esperanto-Movado:

s.: J. MERCHANT, Prezidanto.

Rob. KREUZ, Ĝenerala Sekretario.

La L.K.K. kun plezuro transdonas la enhavon de ĉi supra letero al ĉiuj siaj kunlaborantoj kaj kunlaborantinoj.

OFICIALA PROTOKOLO PRI LA 20a KONGRESO

SOLENA MALFERMA KUNSIDO

la 4. Aŭgusto 1928 en la Granda Festsalono de la Zoologia Ĝardeno.

Du minutojn antaŭ la 21 horo eksonas la tamburado de la urba tambura korpuso, kiu vestita per siaj historiaj kostumoj, staras flanke de la podio. La granda festsalono estas imprese lumigita. Flagoj de ĉiuj nacioj kaj nombro da esperanto-flagoj ornamas la galeriojn. Sur la 1-a kaj la 2-a galerioj multa publiko ĉeestas. La oficiala esperanto-standardo estas starigita apud la prezidanta seĝo.

Precize je la 21 horo la membroj de la Loka Kongresa Komitato, de la Internacia Centra Komitato kaj la ceteraj estraroj suriras la podion sub aplaŭdo de la kongresanoj. Sammomente ĉesas la tamburado. La orgeno solene ludas la belgan nacian himnon «Brabançonne» La Kongresanoj aŭskultas ĝin starante.

Sinjoro Rudolf Hromada, Praha, membro de la Internacia Centra Komitato deklaras la kongreson malfermita. Samtempe en la nomo de I.C.K. kaj de la L.K.K. li proponas por elekto la sekvantan estraron de kongreso :

Prezidanto : S-ro Frans Schoofs, Antverpeno

Vicprezidantoj S-ro Henri Petiau, Gento.

S-ro Oscar Van Schoor, Antverpeno.

S-ro Admiralo Alessio, Romo.

S-ro D-ro E. Archdeacon, Parizo.

S-ro D-ro H. Arnhold, Dresdeno.

S-ro Cen, Singapuro.

S-ro H. Hetzel, Filadelfio.

S-ro Isbrücker, Hago.

S-ro Levi, Konstantinoplo.

S-ro J. Merchant, Sheffield.

S-ro A. Darjuš-Nemseĉi, Tabrizo.

S-ro P. Nylén, Stockholm.

S-ro Nadji Sindhvad, Bombajo.

S-ro Takuo Otaki, parlamentano, Tokio.

Konstanta Ĝen. Sekretario : S-ro Robert Kreuz, Genevo.

Ĝeneralaj Sekretarioj S-ro M. Jaumotte, Antverpeno.

S-ro M. Roost, Antverpeno.

Sekretarioj : S-roj Faes, Ritschie, Vermandere, Antverpeno.

Vicsekretarioj : S-inoj Faes, Schoofs, Antverpeno.

Tiu ĉi propono estas akceptata per aklamado kaj aplaŭdo.

S-ro Frans Schoofs ekokupas la seĝon de l' prezidanto kaj kore dankas pro la elekto. Mi ne faros longan kongresan paroladon li diras. Ni estas tro ĝojaj por povi paroli en tiu ĉi momento solena. Sed koregan dankon ni devas esprimi antaŭ ĉio al la ĉeestintoj de la Sepa Kongreso, kiuj ankaŭ ĉi tiun fojon, partoprenas al la kongreso. Duan fojon nun Antverpeno povas saluti Universalan Kongreson de Esperanto. Kore kaj gastame la urbo akceptas ĉiujn kongresanojn, esperante, ke ili prenos kun si plej agrablan memoron pri Antverpeno.

Koregan dankon la Loka Kongresa Komitato ŝukas al la urbestro kaj al la skabenoj de la urbo, kiuj montris tiom da atento kaj simpatio al nia afero dum la preparo de la kongreso. Se post pliaj 17 jaroj Antverpeno eventuale ankoraŭfoje invitos Universalan Kongreson kaj kiam ni, tiam grizharuloj, sidos ankoraŭ bonsane inter vi, ni espereble povos konstati denove, ke varmaj kaj amikaj esperanto-interrilatoj ankoraŭ ĉiam konservas la simpatian por la nuna kongresurbo. Dezirante bonan sukceson al la baldaŭaj kongreslaboroj kaj ĝuadon dum la okazontaj festoj preparitaj de la L. K. K., li finas per la elvoko Vivu Esperanto ! La kongresanoj vigle aplaŭdas.

Akompanate per orgena ludo, la kongresanoj starantaj kantas la himnon : «La Espero».

Post tio S-ro Schoofs proponas forsendi salut-telegramojn al Lia Moŝto Alberto I, Reĝo de la Belgoj, nuntempe en Kongolando, alta Protektanto de la Kongreso kaj al Lia Moŝto Princo Leopoldo, Duko de Brabanto, Honora Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista. (Akceptita).

Kiel reprezentanto de la urbo Antverpeno kaj anstataŭ la urbestro S-ro Frans Van Cauwelaert, kiu estas malhelpita ĉeesti la kunsidon, S-ro Junes, skabeno de la urbo Antverpeno, anstataŭante la urbestron, deziras bonvenon al la alilandaj gastoj kaj laŭdas la Esperanto-movadon precipe pro ĝia pacema tendenco.

S-ro M. Jaumotte, ĝenerala sekretario de la kongreso tradukas la en flandra lingvo faritan paroladon tuj en Esperanton. (Granda aplaŭdo.)

La Prezidanto post tio salutas la registarojn kaj aŭtoritatojn oficiale reprezentitajn en la kongreso per speciala delegito

REGISTAROJ

Aŭstrio S-ro Ĝenerala Konsulo Armand Hessel, Antverpeno
Brazilo S-ro Prof. D-ro E. Backhäuser, Rio de Janeiro.
Germanujo S-ro Barono von Tucher, Konsulo, Antverpeno.
Ĥinujo : S-ro Hu-Ju-Ce, Ŝanhajo.
Hispanujo : S-ro Majoro Mangada-Rosenörn, Madrido.
Hungarujo S-ro Grafo Olivier Woracziczky, Ambasadoro en Bruselo.
Nederlando S-ro Isbrücker, Hago.
Norvegujo : S-ro Supera Leŭtenanto Bugge-Paulsen, Oslo.
Rumanujo : S-ro Cuyverts, reprezentanto de la Konsulo en Antverpeno.
Usono S-ro Ĝenerala Konsulo Messersmith, Antverpeno.

AŬTORITATOJ

Internacia Labor-Oficejo de la Ligo de Nacioj, Genève.
Urbo de Budapeŝt S-ro P. Tolnaj, Budapeŝt.
Urbo de Toulouse : S-ro D-ro Badin, Toulouse.
Urbo de Vieno : S-ro H. Steiner, Vieno.

Post tio longe kaj spontane, aplaŭdita, ekprenas la parolon D-ro Edmond Privat, Prezidanto de la Internacia Centra Komitato, por sia kutima kongresa parolado.

KONGRESA PAROLADO DE D-ro EDMOND PRIVAT

Karaj gesamideanoj !

Estas granda ĝojo kunveni ĉi tie en Antverpeno denove post dek sep jaroj kaj revidi kelkajn bone konatajn vizaĝojn. Ni sciis jam pro sperto kiel kore akceptataj ni estos. Se vi ankoraŭfoje nin invitos post novaj dek sep jaroj, ni revenos kun niaj nepoj dankeme kaj fide.

Tute taŭgis por la nunjara somera universitato la temo pri Maro kaj Navigacio. Antverpeno estas ja centro de tiu vasta komunikado trans maroj kaj oceanoj. Super ĝia kajo staras antikva turo de historia ĉefpreĝejo kaj sub ties ombro albordiĝas la grandaj vaporŝipoj el Japanujo.

Ŝajnus kvazaŭ la senlimaj akvoj devus estis limo inter homoj kaj popoloj. Sed male jam de miljaroj la maro ligis ilin eĉ pli ol tero. Ĝi fariĝis la granda komunikilo por interŝanĝado de komercaĵoj kaj ideoj. Miloj kaj miloj da ŝipoj alvenas ĉi tien aŭ forveturas kun karbo por hejtigi, fruktoj por nutri aŭ libroj por instrui. Trans maroj la

mondo sentas sin iom solidara. En havenoj oni spiras kun la sala vento iom da homara unueco.

Sed ĝuste la lingva flanko de tia mondunueco per la maro estas plorinde ne taŭga. En havenoj regas misuzo kaj miksaĵo de kelkaj frazoj el diversaj lingvoj. Iom da «pigin» angla aŭ da malbonigata franca lingvo. Sufiĉe por interŝanĝi la plej urĝajn salutojn, ordonojn aŭ mendojn, sed nenio pli.

Ni, esperantistoj, estas pli postulemaj. Ni volas ke la homoj havu propran veran lingvon por esprimi sian unuecon, lingvon en kiu ili povu senti kaj pensi, lingvon en kiu ili povu tute libere fratiĝadi kun siaj kunuloj el ĉiuj nacioj.

Ne detruante la naciajn lingvojn kaj kulturojn, ni deziras faciligi tutmondan kulturon per helpa lingvo simbolanta la spiriton de la novaj tempoj, la sopiron de l'homaro al sia unueco. Ne teoria sed praktika estas nia deziro, ĉar tiun lingvon ni alportas jam pretan, jam vivantan, jam elprovitan de kvardek jaroj da uzado kaj senĉesa progresado.

En tiu ĉi granda haveno, kruciĝo de ĉiuj civilizoj trans la unuiga maro, sonu denove la lingvo de Zamenhof kiel alvoko al ĉiuj popoloj; malgraŭ ĉiuj diversecoj de raso, lingvo kaj religio, ni estas ja nur unu vasta familio!

Same kiel la maro, tiel ankaŭ Esperanto helpas interŝanĝojn. Per ĝi la malgrandaj nacioj diskonigis eksterlande sian literaturon. Kiu el ni ne legis en Esperanto la belajn verkojn tradukitajn el la flandra lingvo tiom amata ĉi tie?

Sed apud la naciaj kulturoj, la mondo nun bezonas la internacian. Antaŭ kelkaj tagoj kunvenis en Hago 450 reprezentantoj de plej diversaj religioj por diskuti pri la paco. Kune sidis episkopo ĉeĥoslovaka, budista, hinda, mahometana poeto el malaja insulo. Ĉiuj paroladoj estis tradukitaj nur en Esperanton. Tio estis ja la revo de nia Majstro, ke lia lingvo servu por forigo de l'antaŭjuĝoj inter diversaj formoj de kredo.

Ne nur sur tiu kampo, sed sur preskaŭ ĉiuj kampoj de la homa vivo bezonata estas nova interkompreno kaj nova edukado de l'homoj. La naciaj lingvoj, la eklezioj, la lernejoj edukis la homojn al nacia sento. Kiu nun instruos ilin pri la internacia? La homojn regas ne nur intereso aŭ racio sed eĉ multe pli forte la sentoj, la emocioj individuaj aŭ kolektivaj. Edukado, religio, poezio riĉa helpis la amon al patrujo. Por akceli la amon al homaro, nun tiom necesan por savi la mondon el milito, kiu helpas por disvastigi novan senton, komunan emociion, fortan esperon kaj volon?

Mankas tie la riĉa lirismo de la naciaj lingvoj, mankas la kantoj, la inspira literaturo. Ankoraŭ blankaj estas la paĝoj. En kiu lingvo ili skribiĝos se ne en tiu Esperanto, kiu ekaperis al la vivo kun la pensoj de D-ro Zamenhof? Jam en ĝi la infanoj kantas la «Esperon» en pli ol mil lernejoj de diversaj landoj. Jam en ĝi komenciĝis embrio de homara poezio. Jam per ĝi disvastiĝis tra la tuta mondo ĉe centmiloj da homoj la «nova sento» pri la unueco de l'homaro.

Pensu pri la granda forto de lingvo kiel homa instigilo kaj disvastigilo de sentoj kaj ideoj! Ĝi estu plia kaŭzo por ne plu perdi tempon je teoriaj diskutoj pri tiu aŭ alia gramatika sistemo. En la Bulonja Deklaracio jam staris antaŭ dudektri jaroj ke «la amikoj de la ideo de Lingvo internacia konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo».

Tio refariĝas pli kaj pli vera nuntempe. Efektive kiom interesas la mondon ĉu la multenombro de l'substantivoj finiĝas per oj aŭ i aŭ

es ? Multe pli interesa estus la fakto, ke vivas jam la mondlingvo kaj ke ĝia sukcesa formo «Esperanto» enradikiĝis en la uzon kaj en la senton ĉe vasta internacia publiko.

Ni do ĉesu atendi ian hipotezan decidon de registaroj aŭ «Komitato de scienculoj». Kiu akiris iom da kutimo je ili ja scias, ke ili ne ŝatas preni tiajn respondecojn. Ili atendas ke vi faru la necesan laboron kaj, laŭ viaj propraj oferoj kaj sukcesoj, ili donos al vi iom post iom la konfirmon oficialan, kiel okazis jam al Esperanto en diversaj kampoj. Do ni daŭrigu nian vojon per laborado kaj verkado en Esperanto.

Kiam ni rigardas la statistikon tiel pacience kolektitan de D-ro Dietterle kaj vidas tiun multpaĝan senfinan liston de lokoj, kie ekzistas esperantistoj en ĉiuj landoj de la mondo, ni povas imagi kiel aspektus en la nokto, se eklumiĝus unu lampo je ĉiu fenestro kie loĝas unu samideano. Estus mirinde vasta ĉeno simila al la stelaro en ĉielo super niaj kapoj. Se ĝin ekvidus la nigra birdo de l'milito, la aeroplano gasbomba, rondzumanta tra la nokto en sia krima flugo, ĝi mirus pri tiom da lumoj kvazaŭ miloj da okuloj de l'homara konscienco rigardantaj al ĝi kun kondamno. Ke falu por ĉiam tiu nigra birdo de l'milito kaj lian malbenatan regnon anstataŭ nova regno de l'harmonio, tio estu nia celo kaj nia kaŭzo por labori !

La kongresanaro ripete aplaudas D-ron Privat, kiu ĉi-tiun fojon per malpli longa parolado, sed per sia kutima elokventeco plialtigis la kutiman solenecon de la malferma kunsido.

La Prezidanto post tio legas la liston de la

ORGANIZOJ KAJ KORPORACIOJ REPRESENTITAJ

en la kongreso, kaj salutas la reprezentantojn

Asocio por la Internacia Helplingvo (IALA), New-York.
Alianĉo Internacia por Libera Interŝanĝo (AILE), Parizo.
Belga Federacio por Radio-Elektraj Studoj, Mehleno.
Bretona Gazeto «Gwalarn», Brest.
Fremdultrafika Oficejo, Budapest.
Internacia Farmacia Federacio, Hago.
Internacia Centro de l'Bahai-Movado, Haifo (Palestino).
Internacia Foiro de Frankfurt a. Main.
Internacia Ligo por Nova Edukado, Genevo.
Internacia Unio de Radiofonio, Genevo.
Nederlanda Ligo de Instruistoj, Amsterdamo.
Nacia Unio de Instruistoj, Londono.
Reĝa Stenografia Instituto, Bruselo.
Ruĝa Kruco Hispana, Madrid.
Skolta Oficejo Internacia, Londono.
Stenografia Oficejo de l'belga parlamento, Bruselo.
Stenografika Revuo «l'Elan Sténographique» Bruselo.

Komercaj kaj industriaj ĉambroj de :

Antverpeno,
Budapesto,
Belga Cambro, Londono.
Franca Cambro, Londono.
Parizo.
Stuttgart,
Zagreb.

Post tio prenas la parolon S-ro D-ro Badin por la Urbo Toulouse kaj S-ro Steiner por la Urbo Vieno.

La Prezidanto de la Kongreso tiam tre kore salutas la ĉeestantajn anojn de la familio Zamenhof :

F-inon Lydia Zamenhof,
Gesinjorojn Feliks Zamenhof,
F-inon Maria Zamenhof.

invitante ilin sidi sur la estrara podio. Dum S-ro Feliks Zamenhof por la ceteraj familianoj prenas sian lokon apud la kongresa estraro, la kongresanaro preskaŭ senfine akklamas kaj aplaŭdas ĉiujn familia-
nojn, per tio esprimante sian profundan respektan senton al la familio de nia mortinta majstro.

Tuj poste sekvas la vico de salutoj de la reprezentantoj de l'div-
landoj. Post fino de ĉiu saluto la tambura korpuso ceremonie tam-
buras.

LISTO DE L'PAROLINTOJ

Argentino : S-ro Majoro Raven-Hart.
Aŭstrio S-ro Hugo Steiner.
Brazilo : S-ro Konsulo D-ro Arnhold (kiel anstataŭanto)
Britlando S-ro J. Merchant.
Bulgarujo : S-ro Vitanov.
Ĉeĥoslovakio S-ro Bednar por Ĉ. A. E.
S-ro D-ro Bischitzky por Germ. Ligo en Ĉeĥoslovakio
Danlando : S-ino Blicher.
Dancigo : S-ro Fischer.
Estonio-Finlando : S-ro Harteva.
Francujo : S-ro Deligny.
Germanujo : S-ro D-ro Ellerbeck.
Hebreoj : S-ro Lejzerovicz.
Hindujo : S-ro Nadji Sindhwad.
Ĥinujo S-ro Hu-Ju-Ce.
Hispanujo : S-ro Mangada-Rosenörn.
Hungarlando : S-ro D-ro Patai.
Italujo : S-ro D-ro Stromboli.
Japanujo : S-ro Nišimura.
Malezio S-ro Cen.
Nederlando F-ino Offerhaus.
Norvegujo : S-ro Bugge-Paulsen.
Persujo : S-ro A. D. Nemseĉi.
Polujo : S-ro Prof. Bujwid.
Rumanujo S-ro Prager.
Saar-Teritorio S-ro D-ro Meyer.
Sudslavio : S-ro Prof. Novljan.
Svedujo S-ro Nylén.
Svislando : F-ino Tissot.
Usono S-ro Hetzel.
Novzelando kaj Aŭstralazio S-ino Bessie King.

Post la ĉeso de l'ceremonia tamburado de la urba tambura korp-
uso la prezidanto S-ro Schoofs kore dankas al ĉiuj ĉeestantoj kaj
bondezirante ilin por agrabla kongres-restado deklaras la kunsidon
fermita.

Sub la sonoj de bela solena Jubilmarsĉo de flandra komponisto
ludita per la belsona orgeno de S-ro Clement D'Hooge la kongresana-
ro iom post iom forlasas la festsalonon.

Fino de la kunsido 23,15h.

1-a LABORA KUNSIDO

la 6. Aŭgusto 1928 en «Cercle Royal Artistique».

Komenciĝo : 10 h.

Prezidas S-ro Isbrücker, vicprezidanto de la Kongreso.

RED STAR LINE

REGULAJ SERVOJ POR PASAĜEROJ KAJ SARGOJ

INTER

ANTVERPENO - NEW YORK

ANTVERPENO - KANADO

trans **SOUTHAMPTON**

kaj **CHERBOURG**



Krozadoj en la

Mediterranea Maro,

al la Antiloj kaj

ĈIRKAŬ LA MONDO

KUIREJO

SERVADO

KOMFORTO

v/s "BELGENLAND" 27.200 tunojn.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al la

Telegramoj : "STAR"

RED STAR LINE

22, rue des Peignes, ANTVERPENO

Crédit Hypothécaire & Commercial

17, Longue rue Neuve

ANTVERPENO

Ni korespondas Esperante.

BANQUE DE FLANDRE

ANONIMA SOCIETO EN GENT - FONDITA EN 1847

Deponaj kaj duonmonataj kontoj



Diskonto kaj enkasigo de biloj



Kreditleteroj



Konservado de obligacioj kaj titoloj



Aĉeto kaj vendo de obligacioj



Pruntedono sur obligacioj



Enkasigo de kuponoj



Luigo de monkestoj



CIAJ BANKAFEROJ.

Ĝenerala temo : Radio.

La kunsidon malfermas S-ro Fr. Schoofs, prezidanto de la Kongreso per kelkaj oficialaj sciigoj rilate la programon. Li poste petas al S-ro Isbrücker daŭrigi la gvidadon de la kunveno.

S-ro Isbrücker esprimante sian plezuron pro la multnombra ĉeesto al la laborkunsido mallonge paroladas pri la graveco de Esperanto por Radio kaj pri la propaganda signifo de Radio por Esperanto.

Li salutas aparte kore la reprezentanton de la Internacia Unio de Radiofono en Ĝenevo, S-ron Marcel van Soust de Borckenfeldt.

Post tio li petas S-ron D-ron Döhler, estro de la Komisiono por Radio-Statistiko, komisiita de ICK, fari raporton pri la agado en la radio-sfero.

S-ro D-ro W. Döhler (Riesa) tre detale skizas la historion de Esperanto en Radio. Li montras la nunan staton en tiu ĉi kampo kaj faras siajn konkludojn pri tio, kion ni devas ankoraŭ fari.

Li memorigas kiam komence en Usono Esperanto estis unuafoje disaŭdigita per radio en 1922. Tiam nur du stacioj tion faris.

10 stacioj disaŭdigis en 1923, poste la linio konstante supreniras kun 47 stacioj en 1924, 98 stacioj en 1925, 130 stacioj en 1926 kaj 168 stacioj en 1927. La partopreno laŭ landoj estas : 2 landoj en 1922, 5 landoj en 1923, 18 landoj en 1924, 22 landoj en 1925, 31 landoj en 1926, 33 landoj en 1927. En la komenco tie kaj tie ankaŭ okazis disaŭdigoj en Ido. Hodiaŭ neniam Ido-propagando estas plu sentebla. (Aplaŭdo). D-ro Döhler kompilis pri la tuta radio-laboro apartan broŝuron en Esperanto (« Esperanto kaj Radio » represo el la Kongreslibro de la 17-a Germana Esperanto-Kongreso, Potsdam 1927, 39 pĝ. Ĝi estas havebla de Germana Esperanto-Asocio, Johanniterstrasse, 9, Berlin S. W. 61.

Liaj konkludoj por la estonta propagando pere de Radio estas :

Kursoj.

1. Ni uzu staciojn fortajn por certigi, ke la disaŭdigoj iru kiel eble plej malproksimen.

2. Plej bona metodo por kursoj per radio estas tiu de dialogo.

3. Ni zorgu nepre, ke la instruanto havu bonan internacian elparolon de Esperanto.

4. Por ricevi la adresojn de partoprenantoj en radio-kurso kaj por konatiĝi kun ili persone, oni aranĝu konkursojn por tradukoj kaj taskoj farotaj. Estas rekomendinde, tion fari jam en la komenco por vivtenadi la intereson de la lernantoj ĝis la fino de la kurso. Se tro malfrue oni komencas konkurson, perdiĝas multaj interesitoj.

5. Ni klopodu nepre havi helpantojn, kiuj en kiu ajn kazo (forloĝo, malsano, momenta tro-okupo k.t.p.) povu daŭrigi la kurson. Se oni devas subite ĉesigi kurson, la tuta laboro estis vana.

6. Ni evitu, ke tro junaj samideanoj aŭ eĉ duon-esperantistoj ankoraŭ ne bone konantaj la lingvon faru radio-kursojn.

7. Konsekvence ni tre atentu pri la pedagogiaj principoj aplikotaj kaj elektu nur spertajn instruistojn aŭ instruantojn.

Paroladoj.

Pri ili estas malpli dirota. Grandparte ankaŭ por ili validas la kondiĉoj pri kursoj. Bona elparolo antaŭ ĉio estas necesa. D-ro Döhler rakontas kiel modele S-ro Rud. Unger en Zürich organizis la unuajn disaŭdigojn de tiu sufiĉe forta stacio. Li petis la kunlaboron de eminentuloj, tradukis iliajn paroladojn en Esperanton kaj poste disaŭdigis ilin de la stacio. La sukceso estis granda kaj sentebla en nia propagando.

Grava estas la disaŭdigo de esperanto-konferencoj kaj kongresoj.

Se iel eble ĉiuj esperanto-manifestacioj estu radie disaŭdigataj. Preskaŭ ĉie ekzistas nun ebleco pri tio. Bedaŭrinde la kongresejo en Antverpeno ne estas instalita por Radio. Sekve de tio disaŭdigo ne povas okazi tie ĉi.

Programo.

Grava estas sufiĉe frua diskonigo de la programo, por ke interesitoj en- kaj eksterlande povu aŭskulti. Tre ofte nur tro malfrue ili sciigas pri parolado en Esperanto por aŭskulti ĝin. Tio malebligas bonan propagandon.

Li proponas, ke ICK provu atingi per la Internacia Unio de Radiofonio, ke ĉiuj radio-programoj, estu diskonigataj unu semajnon antaŭ la komenciĝo de la koncerna semajna programo.

Anoncado.

Estas dezirinde, ke iom post iom ĉiuj stacioj enkonduku la anoncadon en Esperanto. Ĝis nun nur kelkaj tion faras. Anoncanto ĉe stacio devas bone elparoli. Se ne-esperantisto anoncas, ni instruu al li bone la koncernajn frazojn por eviti malbonan impreson.

Organizo.

Li bedaŭras, ke la Internacia Radio-Asocio nuntempe dormas pro tro-okupiteco de div. personoj. Kun bedaŭro li ankaŭ konstatas la espereble dumtempan ne-aperon de la Internacia Radio-Revuo. Li tamen rekomendas fondi nek novan organizon, nek novan organon. (Aplaŭdo.) La laboro de la komisiono bone sukcesis kaj montris sin kiel taŭga formo por similaj laboroj. Li petas, ke ICK, kiu helpis multe al la laboro, ankaŭ en estonto donu sian tutan helpon al la laboro en tiu ĉi grava kampo. Li ankaŭ alvokas la samideanojn por konstanta helpo kaj plendas, ke multaj ne respondis aŭ respondigis al la enketo, kiun li faris por la statistiko.

Esperanto-Programoj.

Li atentigas, ke fidinda programo de la esperanto-disaŭdigoj estas kompilita de la komisiono (S-ro Jungfer en Lübben). Ĝi aperis en «Heroldo» kaj estos laŭpove daŭrigata. La komisiono, kunlabore kun ICK, klopodas aldoni ĝin ankaŭ al nacilingvaj radio-organoj.

Radio-amatora movado.

D-ro Döhler insistas, ke ni provu pli kaj pli enkonduki Esperanton en la movadon de radio-amatoroj, eksperimentantaj per mallongaj ondoj. Ĝis nun li havas nur 50 adresojn de 8 ŝtatoj. Oni kolektu la adresojn kaj sendu ilin al li.

Fakvortaro.

La fakvortaro por Radio ankoraŭ ne estas sufiĉa. Ni devas kunigi kelkajn spertajn esperantistojn kaj radiistojn por helpi la starigon de kiel eble - plej komplota radio - vortaro teknika.

Se ni ne laboros pli intense, la angla lingvo pli kaj pli enpenetros en la radio-sferojn kaj povos grave malhelpi al nia laboro.

Ĝenerala propagando.

Li tre petas kaj rekomendas, ke neniu entreprenado ĉe iu stacio estu farata sen interrilato kun ICK aŭ la koncerna Nacia Societo. Bona kunlaboro estas necesega por eviti koliziojn kaj erarojn.

Fine li petas, ke ĝenerale oni dediĉu pli da atento al la radio prezentadoj kaj uzu la okazon por gratuli la staciojn, kiuj regule kaj sisteme utiligas Esperanton.

La kunsido per longa aplaŭdo dankas al la parolinto pro tiu ĉi tre detala kaj interesa raporto.

S-ro Raven-Hart (Argentino) substrekas la gravecon, ke ĉiuj stacioj anoncu sin en Esperanto.

S-ro Schwarz, afergvidanto de GEA en Berlino, memorigas pri la broŝuro «Esperanto kaj Radio», menciita jam pli supre.

S-ro D-ro Badin (Toulouse) raportas mallonge pri la radio-agado en Toulouse kaj esprimas sian dankon, ke li ricevis sufiĉan helpon de ĉiuj esperantistoj por bone sukcesi ĉe la stacio de Toulouse.

S-ro Coyle, angla blindulo, deziras atentigi pri la graveco de esperanto-disaŭdigoj por blinduloj. Petas, ke laŭpove oni ankaŭ konsideru la special-dezirojn de blindaj esperantistoj, por kiu Radio estas unu el la plej gravaj helpiloj.

S-ro Rabinovici (Bucaresti) donas ankoraŭ kelkajn kompletigojn,

Li ankaŭ diras, ke en div. landoj estas necese adaptiĝi antaŭ ĉio al la naciaj bezonoj. Li rekomendas al propagandistoj atenti pri tio por eviti malsukcesojn. Rilate muzikon, ofte preferatan, li rekomendas, ke oni ankaŭ disaŭdigu esperanto-muzikaĵojn. Tiamaniere Esperanto ankaŭ aperas en muzik-programoj.

S-ro Applebaum (Liverpool) ŝerce rakontas, kiamaniere li sukcesis diskonigi esperanto-disaŭdigon, ne posedante mem radio-aparaton. Atentigas pri la utileco aperi radio-paroladojn en la gazetaro.

S-ro Kreitz (Düren), blinda esperantisto, proponas ke oni kolektu subskribojn por instigi la staciojn pri enkonduko de Esperanto.

D-ro Döhler poste faras ankoraŭ kelkajn kompletigajn rimarkojn. La komisiono bone notas la dezirojn kaj sugestojn de ĉiuj interesitoj. Ankoraŭfoje petante pri energia kaj laŭcela kunlaboro li dankas al ĉiuj, kiuj ĝis nun sukcese helpis por antaŭenpuŝi Esperanton en Radio.

S-ro Daŭger (Berlino) salutas en la nomo de la Germana Sekcio de la Paneuropa Unio la kongreson nehavinte pli frue okazon pri tio.

Poste **S-ro Kreuz** laŭtlegas grandan nombron da telegramoj el ĉiuj landoj, inter alie unu en Esperanto de la ministro de instruado de Brunsvigo (Aplaŭdo).

Post anoncado de kelkaj aranĝoj dumkongresaj la kunsido estas fermata precize je la 12 h.

2-a LABORA KUNSIDO

la 7. Aŭgusto 1928 en «Cercle Artistique»

Komenciĝo 10 h. Prezidas **S-ro Prof. Collinson**, anstataŭ **S-ro Oscar Van Schoor**, viceprezidanto de la Kongreso.

Ĝenerala temo : Universitatoj.

S-ro Prof. Collinson malfermas la kunsidon substrekante la gravecon de la diskutota problemo de plej racia organizado de nia movado en universitatoj.

Stud. Ing. Zylberstejn (Toulouse) raportas pri la Kunveno de Esperantistaj Universitatoj en Bruselo, okazinta ĵus antaŭ la Unversala Kongreso. Partoprenis en ĝi ĉ. 20 delegitoj de studentaj kaj universitataj grupoj el 6 landoj. La kunveno tre detale pridiskutis la organizon de la studenta movado esperantista en universitataj rondoj. Ĝi akceptis kelkajn dezir-esprimojn, submetotajn al la respektivaj asocioj kaj personoj. Li submetas al la atento de la Kunsido la necesecon, urĝe starigi universitatajn organizaĵojn kunigantajn kune studentojn kaj profesorojn por prizorgi la propagandon en la univers-

itatoj. Aliflanke li sugestas kunligi laŭeble la propagando-organizaĵojn universitatajn kun la koncernaj aplikaj societoj kaj fiksi laŭeble unikan kotizon por krei unu grandan centron por universitata movado kun plenaŭtonomaj fakbranĉoj.

S-ro Prof. Collinson dankas al S-ro Zylberstejn pro la farita laboro kaj ĉefe pro la aranĝo de la interesa kunveno en Bruselo. Li esprimas sian aprobon pri la neceseco plej baldaŭ starigi landajn universitatajn organizaĵojn kaj informas pri la progresoj de Esperanto inter anglaj profesoroj.

S-ro Zylbestejn tiam raportas pri la agado de la Franclanda Esp. Universitata Federacio starigita antaŭ unu jaro, kiu sukcesis jam krei ses sekciojn en div. landoj kun patronado de kelkaj rektoroj, dekanoj kaj anoj de la Franca Instituto. Li raportas ankaŭ pri la unua kongreso de tiu federacio, okazinta en Toulouse, kiu estis la unua provo organizi apartajn universitatajn manifestaciojn kaj kiu bele sukcesis.

S-ro Prof. Bujwid, Krakow, bedaŭras, ke Esperanto ankoraŭ ne trovis la merititan rekonon ĉe la univ. profesoro, sed sciigas, ke tamen lastjare formiĝis en Poznan grupo de universitataj profesoroj amikoj de nia movado kaj esperas, ke tio estos unua paŝo de vigla progreso inter profesoroj polaj.

Stud. Steiner, Vieno, raportas pri la movado en la aŭstriaĵ akadem-iaj rondoj kaj pri la agado de la tri jam ekzistantaj grupoj en Vieno kaj Graz.

S-ro Karl Minor, Hamburgo, laŭdas la belan agadon de esp. medicinistoj, kiuj donas ekzemplon al ĉiuj universitanoj esperantistaj kaj kontribuas per ilia bela revuo al diskonigo de nia lingvo.

S-ro Prof. Hch. Rissom (Bergedorf) parolas pri la movado universitata en Germanujo, pri la Akademia Esperanto-Unuiĝo kaj Berlina Akademia Rondo.

Stud. Gaston Van der Lyn raportas pri la movado en belgaj universitatoj kaj pri la grupoj, antaŭ ne longe kreitaj ĉe la Brusela Universitato kaj la Antverpena Supera Instituto de Komercio.

S-ro Prof. Collinson estante devigata forlasi la kunvenon, transdonas la prezidantecon al S-ro P-ro D-ro Migliorini (Romo).

Stud. Ziomek raportas pri la movado en la polaj studentaj rondoj kaj pri la laboro de la tre viglaj studentaj grupoj ĉe la Universitatoj de Varsovio kaj Krakovo.

S-ro Prof. Pinty, el Alĝerio, proponas la kreon de provizora Internacia Komisiono de Universitatoj, kiu servus kiel gvid-centro ĝis la kreo de Internacia Esperanta Universitata Federacio kaj zorgus pri la movado en la diverslandaj universitataj rondoj (profesoroj kaj studentoj). Instigante la starigon de landaj organizaĵoj, servoj k.t.p. Tiu ĉi propono estas unuanime akceptata. Por la komisiono estas elektataj : Prof. D-ro Bujwid, Krakow ; Prof. Collinson, Liverpool ; Prof. Migliorini, Romo ; Prof. Schmidt, Hannover ; Prof. Pinty (Alĝerio) ; stud. inĝ. Zylberstejn, Toulouse ; stud. Eric Mawson, Liverpool ; F-ino Bernson, Lille ; S-ro Elvin, Cambridge ; stud. John Lester Lewine, New-York ; S-ro Ziomek, Krakow ; S-ro Spiegel, Berlin. La komisiono estos kompletigota per reprezentantoj de aliaj landoj post interrilatado kun la respektivaj grupoj.

Fino de la kunsido : 11 h.

Post la kunsido okazis parolado pri Vieno, kun lumbildoj, invitanta al la Antaŭkongreso en Vieno en 1929 kaj pri Budapest (Filmo), la urbo de la 21-a Universala Kongreso de Esperanto.

FESTA KUNSIDO OKAZE DE LA 20-JARA JUBILEO DE LA UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

la 8. Aŭgusto 1928 en la Granda Salono de «Cercle Royal Artistique».

JUBILEA KUNVENO DE UEA

Milo da kongresanoj plenigis la vastan salonon por festi la 20-jaran jubileon de UEA dum la 20-a kongreso. D-ro Privat malfermis la kunsidon per mallonga parolado pri la fondo de UEA. Antaŭ 20 jaroj Hector Hodler tion faris por savi la Esperantistaron el teoriaj disputoj. Tion li sukcesis kaj la uragano pasis. Hodiaŭ Ido preskaŭ mortis, sed Esperanto vivas kaj prosperas. Kvankam UEA ankoraŭ ne tute atingis la dezirindan dekmilon da anoj, ĝi fariĝis tamen la solida bazo de nia movado malgraŭ ĉiuj ekonomiaj malfacilaĵoj de la milito kaj postmilito. Danke ni memoru al tiuj, kiuj malaperis el niaj rangoj, sed kies inspiro vivas en niaj koroj : nia Majsro D-ro Zamenhof, Hector Hodler, Th. Rousseau, Bolingbroke Mudie k. a.

La komitato de UEA decidis esprimi sian kaj vian dankemon al 21 delegitoj de UEA, kiuj jam deĵoris dudek jarojn, de post la fondo mem ilin ĝi elektis honoraj membroj de la Asocio :

Georges BAIRE, Boulogne-sur-Mer; Paul BERENGUIER, Toulon; Louis BOUVIER, Poix; Charles BRUNET, Bordeaux; Antonio CARBONELL Y BOSQUE, Alcira; Ch. CRESP, Cannes; Walter BELL CURRIE, Burnley; Ernest DELIGNY, St. Omer; Eugène CABERT, St.-Etienne; J. GARZON RUIZ, San Fernando; Alberic HUMÉZ, Douai; Ludwig ISTELE, Wiesbaden; Charles JAYET, Morges; Bernhard KOTZ, Leipzig; Vojtech KRAUS, Praha; Stefano LA COLLA, Palermo; Armand LANDENNE, Huy; C. Vincent RICHARD, Tanger; François SOUBRANNE, Tulle; Georges STROELE, Neuchâtel; P. J. VERMAAS Rotterdam.

Ce la lego de la nomoj la aŭdantaro ovacias ilin. Kelkaj ĉeestas la kunvenon kaj ricevas korajn gratulojn.

La sukceso de UEA estas antaŭ ĉio ŝuldata al la fidela oferema servado de ĉiuj delegitoj, ĉiutage kaj senbrue laborantaj en sia loko; diras D-ro Privat. Ili ĉiuj ricevu la esprimon de nia sincera danko !

Post la festa parto, venas la malfesta. Dum la vintro la gvidado kaj administrado de UEA estis furioze atakata. Ĉar la membraro nepre rajtas je plena kontrolo por scii la veron pri ĉio, la prezidantoj petis la anojn de UEA en la plej gravaj naciaj Esperanto-Kongresoj elekti reprezentantojn por fari enketon en Genevo. La enketa komisiono sidis dum tri tagoj tie kaj zorgo ekzamenis ĉiujn kritikatajn punktojn.

Ĝi faris al la estraro diversajn rekomendojn por plibonigo de kelkaj teknikaj aranĝoj, sed ĝi trovis tute ne laŭfaktaj kaj eĉ kalumniaj la ĉefajn asertojn presitajn en la Delanoue-cirkuleroj kaj ĝi forte protestis kontraŭ tia disvastigado de malveraĵoj.

S-roj Newell kaj Blaïse legas la konkludojn de la enketa komisiono kaj, laŭ peto de la aŭdantaro, la tutan protokolon de ĝiaj ses kunsidoj en Genevo, poste ankaŭ la rezolucion de la publika kunsido de UEA kun la Naciaj Societoj, kiu esprimas sian fidon al la nuna estraro de UEA kaj dankas ĝin pro ĝia laboro. Ĝin konfirmas la kongresanoj kun granda aplaŭdo.

Post kelkaj demandoj pri la sankcioj kontraŭ kalumniantoj, la pli frua apero de la gazeto kaj la amplekso de la jarlibro, laŭ klarigaj respondoj de la Direktoro, la kongresanoj unuanime aprobas ankaŭ la raporton pri la pasinta jaro kaj faras ovacion al S-ro Hans Jakob.

Post fermo de la diskuto pri la raporto, D-ro Privat esprimas

dankon pro sia reelekto kiel prezidanto de UEA, kvankam li rifuzis esti kandidato, sed li ne deziras akcepti novan periodon de ofico. Li jam eksiĝis el ICK kaj petas, ke oni trovu alian prezidanton ankaŭ por UEA. Li ŝatus retiriĝi de la gvidaj ŝarĝoj por labori sur literatura kampo. Estas bone ŝanĝi niajn gvidantojn de tempo al tempo. Ne unu homo, konkludas D-ro Privat, faras la sukceson de Esperanto, sed miloj kaj miloj da sindonaj samideanoj en la tuta mondo per sia fidela kaj pacienca kunagado.»

S-ro Karl Minor (Hamburg) protestas kontraŭ tiu eksiĝo. Ŝanĝo, estas utila nur kiam ĝi havigas plibonigon. Se ne, ĝi fariĝas granda perdo, eble neriparebla.

S-ro Mangada deklaras, ke la nuna prezidanto de UEA estas ne anstataŭebla kaj proponas konfirmi lin per aklamado. La kongresanoj stariĝas kun tondra aplaŭdo, sed D-ro Privat fermas la kunsidon per firma svingo de la sonorilo.

3-a LABORA KUNSIDO

la 9. Aŭgusto en «Cercle Royal Artistique».

Komenciĝo : 15 h.

Prezidas : S-ro Frans Schoofs, prezidanto de la Kongreso.

Ĝenerala temo : Oficialo raportaro.

Raporto de la Lingva Komitato kaj Akademio.

S-ro J. M. Warden, Edingburgh, Viceprezidanto de la Akademio, transdonas la salutojn de la Prezidanto de la Akademio S-ro Prof. Th. Cart, esprimante sian viglan bedaŭron, ke Prof. Cart pro div. kaŭzoj ne povas ĉeesti la kongreson. Li tre esperas, ke en la proksimaj kongresoj la prezidanto de la Akademio povos mem reprezenti tiun ĉi gravan institucion de nia movado.

Supozante, ke ĉiuj kongresanoj jam legis la oficialajn raportojn de la Akademio, li nur mallonge komentarias la raportojn mem. Antaŭ ĉio li substrekas, ke la Lingva Komitato kaj la Akademio, male al la kelkafoje esprimita kritiko laboras kaj funkcias laŭ plej bona povo. Por pli granda aktiveco kaj por pliaj laboroj necesas havi pli da mono. Gis nun mankas tiu rimedo.

Li petas ĉiujn ; kiuj povas kunhelpi, subteni la laboron de niaj lingvaj institucioj.

Post tio la kunsido sen specialaj rimarkoj aplaŭde aprobas la raporton.

RAPORTO DE ICK

S-ro Rob. Kreuz, ĝen. sekretario de ICK konstatante la neeblecon laŭtlegi la tutan raporton de ICK. donas kelkajn klarigojn kaj kompletigojn al la raporto de ICK. ĉefe pri la propagando en transmaraj landoj (citante div. ekzemplojn de sukcesa agado en malfacilaj cirkonstancoj) pri la efiko de la kvinlingva bulteno «I. E. S.» ; pri la graveco de interveno en kongresoj kaj konferencoj kaj pri la utileco de ŝlosiloj.

Li precipe atentigas pri la fakto, ke ICK. nur povas interveni, se ekzistas la necesa bazo por laboro. ICK. ne povas interveni ĉie kaj nur agi laŭ siaj rimedoj disponeblaj. Ĝi ankaŭ povas sukcese helpi nur, se en la koncerna kampo troviĝas helpantoj, kiuj povas certigi kontinuecon de la komencita agado. Fine ne estas eble al ĝi kiel centra institucio de la movado interveni kie ajn sen kunlaboro de la koncerna nacia societo kaj de funkciajtaĵ faksocietoj Malgraŭ ĉio la sekretario klopodas laŭpove servi plej individue.

S-ro Mangada-Rosenörn (Madrid) konfirmas sub la ĉapitro «Telegrafio» la decidon de la hispana poŝto pri allaso de «Esperanto» por tielnomataj «prokrastitaj telegramoj».

S-ro J. Fethke (Berlin) rilatante al la punkto «Ekstera propagando» altiras la atenton al uzado de filmo kaj supozas, ke ICK. ĝis nun tute preterlasis tiun ĉi perspektivon.

S-ro Kreuz, ĝen. sekr. de ICK, respondas al tio, ke larĝa projekto de kulturfilmo per Esperanto estis jam pritraktata de ICK. La projekto ne efektiviĝis pro la neebleco fluidigi la necesan kapitalon.

S-ro D-ro Döhler (Riesa) atentigas pri la estonteco de «parolanta filmo» kaj insistas, ke ICK faru sian tutan eblon por tie enkondukigi Esperanton.

S-ro Mangada-Rosenörn (Madrid) rekomendas, ke la Naciaj Societoj subtenu tiun ĉi klopodadon, ĉar sen tio ĝi ne sukcesos.

S-ro Orengo (La Spezia) petas informon, ĉu la siatempa novaĵo pri enkonduko de esperanto-afiŝoj en internaciaj vagonoj de Sudslavio estos serioza kaj propagandinda.

S-ro Kreuz respondas, ke jes kaj atentigas pri la koncerna sciigo en la oficiala raporto de ICK (pĝ. 47 de la Kongresa Libro). ICK. atendas ankoraŭ novan decidon de la ministerio por fina efektiviĝo de la afiŝado. La decido mem nur ekvalidiĝas laŭ la statuto de la Internacia Vagona Konvencio la 1. Majo 1928.

S-ro Hoehn (Köln) plende postulas klarigon pri tio, kion ICK. entreprenis, por ke Esperanto estu nepre reprezentata en la granda «Pressa» -ekspozicio.

S-ro Kreuz (ICK.) kaj Schwarz (GEA.) respondas al tio per la necesaj detaloj, el kio evidentiĝas, ke sole financ-kaŭzoj malhelpis manifestacion por Esperanto en tiu grava ekspozicio.

Post tio la raporto de ICK estas bloke aprokata de la kunveno.

S-ro Schoofs, prezidanto de la kongreso, tiam sciigas, ke ICK, en sia kunsido okazinta ĵus antaŭ la 3-a Labora Kunsido, faris la sekvantajn decidojn

1. Elektis S-ron D-ron Em. Privat, Genève kiel hon. prezidanton de ICK ;
2. Elektis S-ron J. Merchant, Sheffield, kiel prezidanton de ICK ;
3. La kunsido de la Ĝeneralo Estraro jam reelektis la laŭvice eksigantajn membrojn de ICK., S-ron M. Rollet de l'Isle kaj S-ron Julia Isbrücker.

Li mallonge sed plej kore dankas je la nomo de la Kongreso, S-ron Privat pro la sennombraj servoj faritaj dum lia multjara gvidada periodo kaj gratulas lin pro lia elekto kiel honora Prezidanto de ICK.

Al S-ro John Merchant, li adresas gratulojn dezirante al li grandan kuraĝon en la plenumo de la misio, kiun li transprenis de la ŝultroj de D-ro Privat : «La tasko estas malfacila. Je la nomo de la tuta organizita Esperantistaro la nova prezidanto akceptu koran bondeziron pri bona ŝanco !».

La kunsido per longa aplaŭdo esprimas sian simpatian al la ĉi supraj decidoj.

RAPORTO DE K.R.

S-ro Fr. Schoofs, sekretario-kasisto de K. R., resumas la raporton de la Konstanta Reprezentantaro de la naciaj societoj Esperantistaj dum la pasinta jaro, el kiu aperas, ke se la kelkaj ĝis nun ne ankoraŭ pagintaj societoj plenumas sian devon, ni povos ĝoji pri senhalta progresado de la enspezoj, fakto kiu signifos, ke la Esperantistaro

definitive konscias pri la neceseco regule subteni la centrajn organizaĵojn, kiuj devas ĝin reprezenti en la mondo.

Post mallonga diskuto la kunveno akceptas la raporton presitan en la kongreslibro.

RAPORTO DE UEA.

La raporto de UEA ne plu estas legata, post kiam la jubilea kunsido de la Asocio ĝin jam aprobis.

Per tio finas la ĉefa temo de la kunsido. Ĉar la tagordo enhavas ankoraŭ kelkajn gravajn punktojn diskutotajn, la prezidanto malfermas apartan diskuton pri ili.

S-ro H. Steiner, prezidanto de la Muzea Komitato diskonigas la detalojn pri la en Vieno iniciatita Internacia Esperanto-Muzeo, klarigante, kiaj grandaj perspektivoj malfermiĝas por ni fari tie efikan propagandon por ĉiam. Li alvokas ĉiujn esperantistojn helpi al tiu ĉi entrepreno kaj dankas kore al tiuj, kiuj tion jam faris.

S-ro Schoofs poste legas la sekvantan deklaron de la Ĝenerala Estraro rilate la Internacian Muzeon en Vieno, kiu tekstas

«La Ĝenerala Estraro de la Esperanto-Movado, bazante sur la aparte farita decido, ke neniu propaganda entrepreno estu plu farata sen antaŭa certeco pri la financa flanko, protokole konstatas, ke la Internacia Esperanto-Muzeo, laŭ deklaro de la prezidanto de la iniciatinta komitato S-ro H. Steiner estante privata entreprenado sendependa ne estas oficiala institucio de la Esperanto-Movado.»

Plena libereco estas lasata al ĉiu, kiu deziras subteni tiun ĉi entreprenadon. La prezidanto eĉ rekomendas tion fari laŭ plej bona povo.

S-ro Schwarz de GEA (Berlin) atentigas pri div. fondaĵoj neklaraj kaj petas rekomendi al la esperantistoj, fermi siajn poŝojn kaj monujojn kiam la oficialaj institucioj ne subtenas ilin aŭ ne povas preni sur sin la respondecon pri ili. (Aplaŭdon.)

S-ro Anglada (Madrid) demandas klarigojn pri la refondita Spesmila Banko. Li neniam ricevis respondon al siaj demandoj, kvankam la fondintoj promesis tion en siaj sciigoj.

S-ro Kreuz respondas, ke ankaŭ ICK. neniam ricevis respondon al siaj demandoj.

S-ro Onnen (Amsterdam) sciigas, ke la fondaĵo ne plu ekzistas.

S-ro Krysta (Ĉeh. Teschen) klarigas sian projekton al la Ĝenerala Estraro de la Movado organizi subskriban plebisciton por enkonduko de Esperanto en lernejojn de ĉiuj landoj.

S-ro Kreuz respondas, ke ICK konas la projekton, sed formalan proponon ricevis nur kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. Pro tio ICK. ne povis ankoraŭ studi la detalojn. Li petas, ke S-ro Krysta, por konformiĝi al la ĵus farita decido de la Ĝenerala Estraro ankaŭ donu la necesajn klarigojn pri la antaŭvidita aŭ antaŭvidota financa solvo de la projekto.

S-roj Hromada (Praha), Dubois (Paris), D-ro Liebeck (Berlin) kaj D-ro Dreher (Krakow) farante kelkajn rimarkojn pri la detaloj varme subtenas la tutan ideon.

La prezidanto proponas post la diskuto, ke S-ro Krysta sendu ankoraŭ ĉiujn detalojn pri la propono al ICK en Genevo, kiu tiam okupos sin pri la tuta afero por vidi, kiamanier ĝi estas efektivebla.

Post kelkaj oficialaj informoj rilate la proksiman programon, S-ro Schoofs fermas la kunsidon.

Fino 18,20 h.

Nederlandse

Gist- & Spiritusfabriek

(Nederlanda Fabriko de Fermento kaj Alkoholo)

ANONIMA SOCIETO

Societa Sidejo : **DELFT** (Nederlando)

Fabrikejo : BRUGES-BASSINS (Belgio)

Filioj BRUSELO kaj HUY (Belgio)

Produktajoj :

Rega Fermento

Alkoholo kaj Brando

Eldistilaj Rekrementoj

Fako "Fermento kaj Rekrementoj" : Bruges-Bassins
Fako "Alkoholo kaj Brando" : 378, Av. Van Volxem, Bruselo

Telefono : { Bruges No 8 & 908
Bruxell. BR. 8338
Huy No 40 }
Telegr. : { Bruxelles
Bruges
Huy }
"Gistfabriek"

BELGA ANTOLOGIO

DE CENTO DA FLANDRAJ KAJ FRANCLINGVAJ AŬTOROJ.

Du volumoj

600 paĝoj (22 x 15 cm.)

La franco parto aperis

La flandra parto aperos baldaŭ.

Prezo : 8 Belgojn por la 2 volumoj.

Belga Esperanto-Instituto

(KOOPERA SOCIETO)

KLEINE HONDSTRAAT 11

Postĉekkonto 1669.58

ANTVERPENO.



FERMA KUNSIDO (Rezolucioj)

10 Aŭgusto 1928 en «Cercle Royal Artistique».

Komenciĝo 11 h.

Prezidas : S-ro J. Merchant.

S-ro Merchant, malfermante la lastan kunsidon de la Kongreso, salutas korege la kongresanojn. Li sciigas, ke D-ro Privat, ne prezidas la Ferman Kunsidon kaj ke li reprezentas lin en ĝi. Ni ne perdis lin, diras S-ro Merchant, nŭ ne perdis liajn talentojn kaj kapablon lian fervoron kaj lian entuziasmon por nia afero. Ankaŭ estonte li estos nia fidela kunbatalanto, kiu servos al Esperanto, ĉiam, kiam li povos. Sed post multjara laboro li decidis ripozi kaj ne plu preni sur sin la samajn ŝarĝojn, kiujn li ĝis nun havis. D-ro Privat intencas dum proksima tempo sin dediĉi pli intense al verkado en Esperanto Estas nenia dubo pri tio, ke li denove valore pliriĉigos nian literaturon. Ni bondeziras lin pro tio.

S-ro P. Tolnai (H.E.S.), en la nomo de la Prepara Komitato de Budapest, invitas kore al vizito de la 21-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la hungara ĉefurbo. ICK definitive akceptis la inviton. La Budapestaj samideanoj ĝuas la helpon kaj subtenon de ĉiuj oficialaj institucioj kaj preparas seriozan kongreson, kies unua celo estas servi al nia granda idealo. (Aplaŭdo.)

La Konst. Ĝenerala Sekretario, S-ro Kreuz, laŭtlegas proponon de rezolucio, ricevitan de S-ro Nikolao Hohlov

«La 20-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno sankcias la 14 Aprilo de ĉiu jaro (la mortotagon de D-ro Zamenhof) kiel Tagon de la Originala Esperanto-Literaturo.

La propono estas sen diskuto unuanime akceptata per aklamado.

S-ro Merchant sciigas la kongreson pri la ĵusa morto de Eksministro Radic de Sudslavio, fervora, konvinkita kaj varma amiko de nia afero en tiu lando. Li memorigas kiujn utilajn servojn li faris al nia afero per sia influo al eminentaj diplomatoj kaj parlamentanoj en div. landoj. La Esperanto-movado perdas en li sinceran defendanton de nia granda idealo.

La Konst. Ĝenerala sekretario post tio legas saluton de la sudslavaj esperantistoj al S-ro Radic.

Por honori la mortinton, la prezidanto petas la ĉeestantojn leviĝi de siaj seĝoj.

S-ro Ch. Tarelli, oficiala delegito de la Internacia Laboroficejo en la Ligo de Nacioj en Genevo, salutas la kongreson en la nomo de tiu grava institucio. S-ro Tarelli bedaŭras, ke pro oficdevoj li alvenis nur malfrue al la kongreso kaj ne havis eblecon ĝin saluti antaŭe. Li memorigas la praktikan uzadon de Esperanto en la Labor-Oficejo, kiu prezentas sendube plej bonan helpon al la ĝenerala enkonduko de Esperanto. (Aplaŭdo).

Post tio la Konst. Ĝenerala sekretario prezentas proponon de 2-a rezolucio, submetitan de pluraj amikoj de la Internacia Labor-Oficejo kaj de ĉeestantoj al la interesa prelego de S-ro Tarelli en la Somera Universitato, kiu tekstas laŭjane :

«La Kongreso,

» aŭdinte la paroladon de la reprezentanto de l'Internacia Laboroficejo de la Ligo de Nacioj,

» gratulas la Oficejon pro ĝia konstanta partopreno en la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pro ĝia fruktodona uzo de Esperanto por ĝiaj celoj,

» kaj esperas, ke la Esperantistoj en ĉiuj landoj bone komprenos la gravan rolon, kiun la Internacia Labor-Oficejo ludas en la mondo kaj la fortan apogon, kiun ĝi bezonas kaj meritas de la naciaj aŭtoritatoj kaj de ĉiuj homoj, dezirantaj socian justecon kaj internacian pacon.»

La rezolucio estas unuanime akceptita.

S-ro Victor Hendricx, Sekretario de la Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj sciigas detalojn pri la traktado de la Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Li ankaŭ informas pri la sekvanta rezolucio de tiu kongreso, rekomendante, ke la 20-a Universala Kongreso de Esperanto faru tiun rezolucion la sia. Ĝi tekstas :

«La 4-a Ĝenerala Kunveno de la Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj kunveninta en sia 7-a Internacia Kongreso en Antverpeno, de la 3-11 Aŭgusto,

» konsiderante la gravecon kaj utilecon de Esperanto por la tutmonda blindularo, decidas peti ĉiujn blindul-institutojn, ke Esperanto fariĝu instrua fako, komence ne-deviga, poste deviga.»

U. A. B. E. diskonigos tiun ĉi rezolucion en nacilingvaj cirkuleroj al ĉiuj blindul-institutoj.

La Kunsido unuanime akceptas per aklamo la rezolucion de la Blindulkongreso kiel la sian.

S-ro D-ro Privat, kore aplaŭdita antaŭ ol komenci paroli, esprimas koregan dankon al **S-ro Schoofs**, la ĉefa organizinto de la kongreso, al lia edzino kaj al ĉiuj ne unuope nomeblaj kunlaborantoj. Ili faris eksterordinaran laboron, dum monatoj krom sia profesia laboro dum malmultaj liber-horoj kaj nokthoroj dediĉis sian tutan forton al la preparo de tiu kongreso, kiu estas unika sukceso.

Li mem, nun retiriganta de la oficialaj ŝarĝoj, sed tute ne forlasanta nian aferon aŭ eĉ la vicon de la aktivuloj, deziras direkti kelkajn konsilojn al la esperantistoj.

Li rekomendas, ke novaj esperantistoj legu unuavice la verkojn de nia majstro. Ili memoru pri lia celo kaj lia karaktero. Nia majstro Zamenhof vidis ĉion bonan en la homo. Li ne konis suspekton, estis pacema kaj cedema. Li sciis juĝi la povon de ĉiuj, kiuj povas alporti utilon al nia afero. Li kordeziras, ke ĉiuj samideanoj komprenu tiun larĝan spiritan, kiu gvidis la movadon dum la tempo de lia vivado. Li bedaŭrinde ne plu povas ĉeesti niajn impresajn manifestaciojn, sed ni povas ĵuri labori pli kaj pli por Esperanto por konigi lian verkon vivantan eterne en la homaro (Granda, ripetita aplaŭdo.)

Post li prenas la parolon, **S-ro Feliks Zamenhof**, frato de nia mortinta majstro. Mi venis, li diras, kun timo al tiu ĉi kongreso, supozante, ke prepariĝas io malbona. Laŭ la spertoj jam faritaj mi vidis nigran fantomon. Feliĉe mia supozo estis erara. La aero liberiĝis. Ni povas facile spiri de nove. Niaj nerompitaj fortoj internaj apogos la aferon. Li admonas resti fidela al la fundamento lingva de Esperanto kaj al la ideo interna de nia movado, kiu, kvazaŭ fajro vivas, brulas kaj lumigas la vojon, kiun iras ĉiuj amikoj de nia alta idealo. Li kredas, ke estas ĉies deziro, ke la Dudeka estu oferaltaro, sur kiu forbruliĝu por ĉiam ĉiu malamo, malŝato kaj pasio. (Forta aplaŭdo.)

S-ro Merchant en la nomo de la Ĝenerala Estraro de la Movado dankas kore al **S-ro Schoofs** kaj liaj helpantoj kaj ripetas la dankon al **D-ro Privat** pro la sennombraj servoj, kiujn li faris por progresigi nian aferon.

S-ro Schoofs kortuŝite dankas al la estraro kaj ĉiuj kongresanoj,

pro la helpo, kiun ili alportis. La kongresanoj, li diras, faris mem la plej utilan propagandon, venante tiom multnombre. Kiel pruvas la gazetraportoj la semo de Esperanto jam dufoje jetita en la teron de Antverpeno kaj Belgujo portis riĉan frukton. Ĉiuj Antverpenanoj kaj la belgaj samideanoj zorgos, ke nia rikolto plimultiĝos de jaro al jaro. La Kongreso nun finiĝas kaj li esperas, ke post ne longe ĉiuj organizintoj reprenos sian antaŭan aktivecon por la ĝenerala propagando. (Vigla aplaŭdo.)

S-ro Merchant, kiel novelektita prezidanto de ICK, dankas poste al ĉiuj estraranoj de la movado, kiuj faris utilan laboron. Li ankaŭ esprimas sian sinceran dankon al la ĉefoficiistoj en la Centro, S-ro Robert Kreuz, Ĝenerala sekretario de ICK, kaj S-ro Hans Jakob, direktoro de UEA kaj iliaj helpantoj. Iliaj salajroj ne estas altaj, li diras, kaj la pago eĉ ne povas anstataŭi ilian amon por nia komuna laboro (Aplaŭdo.)

S-ro Schoofs sciigas, ke la nombro de l'kongresanoj atingas reale 1494, do preskaŭ 1500. Kia kontenteco regas, montras ke ĉ. 600 samideanoj enskribiĝis por partopreno en la kongresa festeno. Ĉefe tiu lasta ekzemplo estas signo de solidareco ankoraŭ ne konstatita en antaŭaj kongresoj.

S-ro Merchant kore gratulas pro tio ĉi sukceso.

Fine S-ro Hans Jakob, direktoro de UEA, esprimas sian koran dankon al ĉiuj, kiuj rekonis kion oni faris en la Centro, kaj indulgis, kion oni ne faris. Li regajnis sian fidon en tiu ĉi kongreso kaj hejmeniras kun nova kuraĝo. Li esperas pri ĝoja revido en Budapest.

S-ro Merchant diras, ke estas bone kaj utile rerigardi, por vidi, kio okazis antaŭe kaj en la ĵusa kongreso. Li kredas, ke ni povas konstati senhaltan antaŭeniron de nia movado. Per la vortoj ni iru hejmen kun nova kuraĝo kaj refortigita entuziasmo, harmonie kaj konkorde kunlaboru estonte por nia granda Esperanto afero, li fermas la kunsidon.

La kongresanoj leviĝas kaj starante kantas la himnon «La Espero». Fino 12,15 h.

Antverpeno, la 15 Aŭgusto 1928

La Protokolantoj			La Prezidanto
Rob. Kreuz.	M. Jaumotte	Marcel Roost	Fr. Schoofs
Konst. Ĝen. Sekretario	Ĝeneralaĵ Sekretarioj		

D-ro Edm. Privat	J. Merchant
Hon. Prezidanto de I.C.K.	Prezidanto de I.C.K.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : 12 Bd. du Théâtre, Genève, Svis.

OFICIALA INFORMILO

Jaro 1928, N-ro 10.

PUBLIKA DEKLARO DE LA ENKETA KOMISIONO

Laŭ propono de la prezidanto de UEA kunvenis en Genevo 23-24 kaj 25-a de Julio Enketa Komisiono por ekzameni la gvidadon kaj administradon de la Asocio. Prezidis S-ro Stettler, honora prezidanto de UEA, kaj partoprenis el Ĉeĥoslovakujo D-ro S. Kamaryt, el Britujo S-ro L. N. Newell, kaj el Germanujo D-ro A. Vogt, elektitaj de la kunsidoj de UEA-membroj en tiuj landoj; el Francujo S-ro Georges

Warnier, reprezentanta la Komisionon elektitan de la Nacia kongreso, plie du membroj delegitaj de la Komisiono de UEA, S-roj R. Hromada el Praha, kaj M. Génermont el Moulins Francujo.

Administrado. — La Komisiono konvinkiĝis, ke la administrado de la Asocio estas honesta kaj ŝparema. La Asocia Kapitalo sumas nun same kiom en 1914 kaj estas zorge kaj severe administrata. La Komisiono konstatis la bonordon de la kontoj de la C.O. sed atentigis pri diversaj teknikaj detaloj indaj je plibonigo kaj donis konsilojn pri ili.

Gvidado. — La Komisiono konstatis ke la prezidanto de UEA kaj ICK ricevas neniun salajron por sia granda propaganda kaj prezida laboro, sed nur modestan honorarion por redakti la gazeton *Esperanto* kaj parte kovri siajn elspezojn en propagandaj entreprenoj, sumon laŭstatute fiksitan de la Komisiono de UEA.

Redaktado. — La artikolo «Ni restos fidelaj» aperinta en la Januara numero de *Esperanto* kaj naskinta bedaŭrindan polemikon prave celis agadon pri kiu la raporto de la Enketa Komisiono faros plenan lumon.

Lingvaj demandoj. — La Komisiono konvinkiĝis ke la estraro de UEA sincere deziras konformiĝi al sia statuto pri uzo de la lingvo de Zamenhof kaj eviti lingvajn malpacojn kun la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio.


Cirkuleroj Delanoue. — La Komisiono bedaŭras ke S-ro Delanoue, ĉefdelegito de UEA en Paris, anstataŭ informiĝi pri la faktoj kaj uzi la laŭstatutan vojon por plendoj disvastigis erarigajn cirkulerojn kaj misuzis nomojn aŭ eltiraĵojn el leteroj de aliaj personoj, kiuj poste protestis kontraŭ lia ago.

La Komisiono konstatis ke liaj cirkuleroj entenas malveraĵojn kaj kalumniojn, kiuj meritas severan riproĉon kaj kontraŭ kiuj devas esti protektata la honoro de sindonaj homoj oferantaj sian tempon kaj monon por la movado.

Konkludo. — La Komisiono konvinkiĝis, ke neniu ago malhonesto aŭ kontraŭstatuta okazis ke la elektoj al la Komitato estis tute regule faritaj kaj kontrolitaj. Ĝi raportos detale al la Komitato de UEA pri ĉiu el la ekzamenotaj punktoj kun la celo kiel eble plej perfektigi la funkciadon de la C. O. Ĝi certigas al la esperantistaro, ke UEA meritas ĝian plenan fidon kaj ĝi alvokas al ĉiuj samideanoj ke ili subtenu tiun solidan bazon de nia movado per multnombra aliĝo kaj fidela konstanteco al nia Universala Esperanto-Asocio.

Subskriboj

Ed. Stettler ; M. Génermont ; Rud. Hromada ;
S. Kamaryt ; L. N. Newell ; D-ro A. Vogt ; G. Warnier.



SEPA LISTO DE KONGRESANOJ

1414. S-ro Saur Xiver, Köln a/Rhein (Germanujo).
1415. S-ino Grenkamp-Kornfeld Jerzy, Paris (Francujo).
1416. S-ro Smit Adalberto, lingva profesoro, Den Haag (Nederlando).
1417. S-ro Roubos B. P., ŝtatoficisto, Dordrecht (Nederlando).
1418. S-ro Champy Leon, inĝeniero, Antverpeno (Belgujo).
1419. S-ino Torres-Carreras Mercedes, Barcelona (Hispanujo).
1420. S-ro Zylberstejn Jan, inĝeniero, Lyon (Francujo).
1421. S-ro Bednar Josef, lerneĵ-direktoro, Brno (Ĉeĥoslovakujo).
1422. S-ro Paffenholz Josef, komercisto, Düsseldorf (Germanujo).
1423. S-ino Paffenholz Grete, oficistino, Düsseldorf (Germanujo).
1424. S-ino De Wagenaere, instruistino, Antverpeno (Belgujo).
1425. S-ro Nylén Paul, redaktoro, Stockholm (Svedujo).
1426. S-ro Reuschenbach Josef, Cleve (Germanujo).
1427. Union Internationale de Radiophonie, Genève (Svisujo).
1428. F-ino Culver Julia, Chicago (Usono).
1429. S-ro Esteban Munoz, instruisto, Barcelona (Hispanujo).
1430. S-ro Meire Albert, reprezentanto, Antverpeno (Belgujo).
1431. F-ino Welleman Lientje, Krabbendijke (Nederlando).
1432. S-ino Kaptein Maria, Amsterdam (Nederlando).
1433. S-ro Nišimura Koogecu, Oomoto misiisto, Kameoka (Japanujo).
1434. S-ro Otaka Hideo, Oomoto misiisto, Kameoka (Japanujo).
1435. S-ro Woolfenden Thomas, vendisto, Rochdale (Anglujo).
1436. S-ro Chadwick Jonathan, Rochdale (Anglujo).
1437. S-ino Van Dael, Antverpeno (Belgujo).
1438. F-ino Van Oeckel Irène, instruistino, Antverpeno (Belgujo).
1439. F-ino Craig Elizabeth, instruistino, Musselburgh (Skotlando).
1440. F-ino Craig Margaret, instruistino, Musselburgh (Skotlando).
1441. S-ro Houbart Emile, ĉefredaktoro, Paris (Francujo).
1442. S-ino Permanova Josefa, urba oficisto, Praha (Ĉeĥoslovakujo).
1443. F-ino Koye Emma, Berlin (Germanujo).
1444. S-ro Parker John E., ĵurnalisto, Shipley (Anglujo).
1445. S-ro Arnhold Lisa, Dresden (Germanujo).
1446. S-ino D-ino Lewenz, Berlin-Kladow (Germanujo).
1447. S-ro Naoumoff Constantin, inĝeniero, Valenciennes (Francujo).
1448. S-ro Marin Eugène G., instruisto, Whiteway Colony Stroud (Anglujo).
1449. S-ro Hübner Paul, inĝeniero, Quedlinburg (Germanujo).
1450. S-ro Lodema Andries, Antverpeno (Belgujo).
1451. S-ino Coleman Mary, instruistino, Streatham Hill (Anglujo).
1452. S-ro Coleman Stanley, advokato, Streatham Hill (Anglujo).
1453. S-ro Riederadevall Joan, Gerona (Hispanujo).
1454. S-ro Van Gulck, Jozefo, oficisto, Antverpeno (Belgujo).
1455. F-ino Kennes Jeanne, Antverpeno (Belgujo).
1456. S-ro Dubinski Jakob, studento, Bialystok (Polujo).

1457. F-ino Van Ryn Martha, oficistino, Antverpeno (Belgujo).
1458. F-ino Oudesluys Geertrui, Hago (Nederlando).
1459. S-ro Bunschoten Nicolaas, studento, Hago (Nederlando).
1460. S-ro Van de Vijvere E., Temsche (Belgujo).
1461. S-ro Mascaro Johano, studento, Cambridge (Anglujo).
1462. S-ino Blow Annie E., Luton (Anglujo).
1463. S-ro Littlewood Frank, interpretisto, Dovencourt (Anglujo).
1464. F-ino Way Janet, muzikisto, Lewes (Anglujo).
1465. F-ino Riley Mary, instruistino, Harrogate (Anglujo).
1466. S-ro Harris Frederick A., Birmingham (Anglujo).
1467. S-ino Straumloud Sol., fizistino, Reykjavik (Islando).
1468. F-ino King Evelyn M., stenografistino, Wood Green (Anglujo).
1469. S-ro Pratt Leonard, vendisto, Edmonton (Anglujo).
1470. F-ino Wainwright Henriette, St-Leonards (Anglujo).
1471. S-ino Danneil Henrikino, sekretariino, Genève (Svislando).
1472. S-ro Derweduwen Jules, policoficiro, Antverpeno (Belgujo).
1473. S-ro Pickard W. G., Brockley-Londono (Anglujo).
1474. S-ro Zwaenepoel Gustave, policoficiro, Antverpeno (Belgujo).
1475. S-ro Gaston Rafael, studento, Saragossa (Hispanujo).
1476. S-ino Chapron Marie, Le Mans (Francujo).
1477. S-ro Scaum Joseph, teksisto, Burnley (Anglujo).
1478. S-ro Ward Herbert, teksisto, Burnley (Anglujo).
1479. F-ino Hodson Eva, maŝinistino, Burnley (Anglujo).
1480. S-ro Parker Fred, instruisto, Burnley (Anglujo).
1481. S-ino Hartley H., Burnley (Anglujo).
1482. S-ro Whittam Arthur, Cornholme (Anglujo).
1483. S-ro Hartley Louis, Burnley (Anglujo).
1484. S-ino Hardaker Lillie, Burnley (Anglujo).
1485. S-ro Pinty Jean Jacques, profesoro, Alger (Algerujo).
1486. S-ro Thomas H. Moy, inĝeniero, Londono (Anglujo).
1487. S-ino Preedy E. E., Reading (Anglujo).
1488. S-ino Ford A., Birmingham (Anglujo).
1489. S-ino Moyer Louise, Valenciennes (Francujo).
1490. S-ro Bjornstod A., fervojisto, Oslo (Norvegujo).
1491. S-ro Appelbaum, Erich (Anglujo).
1492. S-ino Sedig, Mignonette, Chicago (Usono).
1493. S-ro Tarelli Charles, oficisto, Genève (Svisujo).
1494. F-ino Hibberd L. A., Sturrey (Anglujo).

FINO.



PRI PRIKONGRESAJ PLENDJOJ. LIBERA INTERPAROLADO INTER JURNALISTOJ.

Publika letero al S-ro Teo Jung.

Estimata Samideano Jung,

Kara Kolego,

Verŝajne vi legis en la pasinta numero de «Belga Esperantisto», la sufiĉe ampleksan raporton, kiun mi kunmetis, dank' al la kunlaborado de diversaj miaj kolegoj, kiuj en revuoj kaj gazetoj Esperantistaj aperigis detalojn pri nia XXa Universala Kongreso.

Mia subskribo verŝajne rememorigis min al vi, kaj ĉar vi certe legis je la fino de mia raporto, ke mi ankaŭ parolos pri la prikongresaj plendoj, vi ne miros vidante, ke mi tiun ĉi fojon metas super mia artikolo «Pri prikongresaj plendoj». Eble iom pli surprizos vin la subtitolo «Publika letero al S-ro Teo Jung».

Tial mi tuj volas al vi klarigi la aferon.

Dum mi, kun la tranĉiloj en unu mano, la glubroseto en la alia, tralegis la diversajn raportojn jam aperintajn, mi kiom eblè plej multe atentis pri la plendoj. Mi eltranĉis la ekstraktojn, kie oni mallaŭdis iun aranĝon, kaj tiuj specialaj eltranĉaĵoj iĝis baldaŭ, se ne ampleksa, tamen bone rimarkebla areto.

Kiam post aperigo de la plena raportaro pri la festoj, mi volis iomete klasigi tiujn plendojn, mi rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj, se ne absolute ĉiuj plendetoj kaj plendoj, estis inspiritaj per viaj, tuj post la kongreso aperintaj, raportoj en «Heroldo». Ĉar vi do ŝajnas esti la patro de tiuj malbonaj novaĵetoj, aŭ, ĉar vi almenaŭ havas la honoron esti la unua kritikinto pri la diversaj malbonaĵoj, mi konsideris, ke, por esti «fair», kiel diras la Anglo, estas al vi, ke mi devas respondi.

Jen do la kialo de la «Publika Letero» al vi...

Post tiu unua klarigo, kiun mi ŝuldis, mi volas ankoraŭ aldoni duan, kiu rilatas nin persone.

Estas inter ni, belgaj ĵurnalistoj, kutimo, diri unu al alia malkaŝe tion, kion ni pensas, kaj la rezultoj de tiu nia sintenado estis ĝenerálmaniere tiom bonaj, ke mi kuraĝos daŭrigi ĝin, ankaŭ kun alilandaj kolegoj.

Nu, mi konfesos al vi, ke mi estas tutordinara ĵurnalista, kiu de la milito gajnas sian ĉiutagan panon, ne par la elspruĉo de la ŝvito sur sia frunto, sed per la ĉiutaga rea elspruĉo de la inko el sia plumo. Hierarhie superaj al mi, ĉiam estas redakcisekretario, ĉefredaktoro, direktoro kaj la nevidebla sed ĉiam sentebla administrantaro.

Vi komprenos, ke tiu mia humila situacio, inspiras al mi multe da respekto, por tiuj personoj, kiuj en mia metio portas la titolon de «ĉefredaktoro». Tial ankaŭ mi havis multe da respekto por vi, kiam, dum tiu ĉi kongreso, mi renkontis vin por la unua fojo dum faka kunsido, kaj mi tuj diris al mi mem: Mi devos post la kongreso vidi, kiamaniere tiu ĉefredaktoro de revuo faras sian metion, kiam li vizitas eksterlandan kongreson, kaj devas raporti pri ĝi.

Kaj vi do komprenos mian ĝojon, kiam mi, simpla ĵurnalisto, leginte la raporton de revudirektoro de « Heroldo » devis vole nevole konkludi, ke se mi estus ĝin verkinta por mia ĉefredaktoro, li estus jam de tri monatoj maldunginta min, kaj mi verŝajne jam estus petinta al vi la adreson, kie en Antverpeno oni manĝas por la duono aŭ eĉ triono de la prezoj, presitaj de la L.K.K. kaj kie vi tamen satmanĝis .

Mi klarigos al vi tiun mian impreson. Vi venis al Antverpeno por reporti por la plej granda semajna Esperanto-gazeto, kaj vi neniam estis tie, kie vi devis esti.

Ni komencu per la festo en la « Harmonio », kie oni festis tiujn bonajn policistojn, pri kiuj vi diras tiom da laŭdaj vortoj. Kion mi legas en via revuo pri ĝi? Aŭskultu :

« Vespere okazis la kutima Interkonatiĝa Vespere. Por ĝi oni luis belan ĝardenon kaj salonon « Harmonie ». En tiu ĉi vespero membrinoj de la grupo. « La Verda Stelo » transdonis al la polica grupo standardon. Bedaŭrinde, kiam mi alvenis, la ceremonio jam estis finita. Tial mi sekvigas pri tiu ĉi afero la raporton de la ĵurnalo « Neptune » en Antverpeno ».

Dimanĉe, vi verŝajne kuniris en la sekvantaro tra la urbo, sed vi ne havis tempon ĉeesti la solenon en la urbdomo. Vi senkulpigas vin jene:

« Aro da reprezentantoj de gvidantaj institucioj de la Esperanto-movado eniris la urbodomon por esti akceptataj de la urbestro. Oni diras, ke ĉi tiuj reprezentantoj estis speciale invititaj. Bedaŭrinde tio okazis en tre nekutima kaj eĉ nekonsvena maniero. En iu kunsido oni anoncis, ke la invititoj povos preni siajn invitkartojn ĉe iu difinita tablo. Sed kiu sciu, ke li estas invitita? Certe multaj iris, opiniante ke ili estas invititaj, kaj devis je sia bedaŭro konstati, ke ili eraris; aliaj, kiuj certe estis invititaj, ne iris. Mi mem ne iris; kvankam mi rajtis supozi, ke mi estis invitita kiel redaktoro de unu el la plej gravaj Esperanto-gazetoj; sed se oni ne laŭ konsvena maniero invitas, ŝajnas al mi preferinde rezigni. Ĉu tiajn aferojn oni ne povus sufiĉe konsideri kaj aranĝi jam antaŭ la kongreso? Mi meroras, ke ankaŭ en Danzig oni invitis al oficialaj gastigoj kvankam konvene per la poŝto sed tro malfrue. Plej bone kaj plej simple estus, ĉiujn biletojn, invitilojn ktp. jam aldoni al la kongresaj dokumentoj, eventuale kun aldona karto aŭ slipo, kiun la kongresano tuj en la unua kongresa tago subskribu kaj sendu (per la kongresa poŝto) al speciala komisiito de L.K.K. kun indiko, ĉu li jes aŭ ne akceptas la inviton.

Oni tre certe povas sekvi viajn lastajn sugestojn. Sed tamen mi volus atentigi vin pri la fakto, ke dum la « Malferma Kunsido » de Sabato, estis anoncita tute klare, kiuj aŭtoritatuloj estis invitataj. La invitoj efektive ne estis nomaj, sed iris al membroj de oficialaj korpusoj en la movado t.e. al bone difinitaj personoj. En la salono mem vi tiun saman vesperon povis akiri vian karton.

Sed plie, se neniu membro de iu organizaĵo rajtas plendi, se li

KONSERVU vian kapitalon por igi ĝin profitdona kaj

AĈETU

Meblojn

Oraĵojn

Manĝilaron

Kuirilojn

Varmigilojn

Lumigilojn

Tablotukaron

Tolon

Kotonon

Peltojn

Vojaĝartiklojn

Bicikledojn

Fotografaparatojn GOERZ, KODAK, AGFA, k.t.p.

ĈION, KION VI DEZIRAS kun

12, 15, 20 kaj 24 MONATOJ DA KREDITO

de la *AGENCE DECHENNE S.A., 18-20-22-24, rue du Persil, BRUSELO*

PETU NIAJN SENPAGAJN KATALOGOJN.



“HIS MASTER’S VOICE”

APARATOJ KAJ DISKOJ

Petu informojn, katalogojn kaj prezojn al niaj Agentoj.

Kiu aŭdis nian aparaton, certe aĉetos ĝin.

ĈIUJ ESPERANTISTOJ
KAPVESTAS

sin ĉe

SAMIDEANO CAUS

Ĉapeloj : ĉiuj Markoj kaj prezoj

Kasketoj por vojaĝi.

Ombrelaj por Sinjorinoj kaj Sinjoroj

Firmo fondita en 1898

Vondelstrato 19, ANTVERPENO

KIE ĈETI PLEJ BONE MAL-
KARE KAJ FIDINDE OL ĈE LA
BONEKONATA FIRMO

V. Vloebergh

Juvelfabrikanto kaj horloĝisto

Rue du Serment, 17 - Malines

Speciala laborejo por riparado

(113)

Por via korespondado
skribu sur la

Poŝtkartoj ilustritaj

kun Esperanto-teksto

pri Antverpeno	30 kartoj	Fr. 4.50
Bruselo	30	4.50
Bruĝo	10	1.50
Kortrijk	10	1.50

por aŭfranko aldonu : en Belgujo F. 0.10, eksterlando
F. 0.35 por ĉiu serio de 10 kartoj.

Belga Esperanto-Instituto

Poŝtĉeko 1689.58 ANTVERPENO.

SAMIDEANOJ! KURAGIGU ESPERANTISTAJN FIRMOJN!

Por via somera ripozloko apud Marbordo, elektu :

LE GRAND HOTEL D'OOSTDUINKERKE

(Korespondas per Esperanto. — Parolas Esperante).

AGRABLA RESTADO DUM TUTA JARO

BONAJ MANGAJOJ. BONAJ VINOJ. TRE MODERAJ PREZOJ.

Generala agentejo por vendado de Francaj vinoj, oleoj,
Skribu al S-ro BENOIT, Grand Hôtel d'Oostduinkerke.

El ĉiuj enspezoj farataj pere de Esperanto. S-ro Benoit dediĉas parton
de 5 % al la propaganda kazo de "Belga Esperantisto".

(103)

ne ĉeestis, vi tamen, malpli ol kiu ajn, tion rajtas fari. La Gazetaro estas kvazaŭ oficiala rekonata Povo en la Mondo, kaj ĵurnalisto havas ĉie la enirrajton, kie ne temas pri sekreta, aŭ tute privata afero. Kaj mi volus peti vin, kion vi estus dirinta, se vi kiel ĉefredaktoro, estus sendinta redaktoron al Antverpeno, kaj ke tiu ĉi estus skribinta al vi: « Senkulpigu min, ĉefredaktora Mosto, mi ne kapablis eniri, ĉar mi ne sciis, kie trovi enirkarton ». — Vi certe estus telegrafinta al li: « Vi estas azeno, kaj tiajn mi ne bezonas en mia redaktejo. Revenu tuj! » ...Kaj kiel tutsimpla ĵurnalisto, mi opinias, ke tiam vi estus bone farinta. Mi bedaŭras, ke mi devas doni al ĉefredaktoro kunsilojn pri ĵurnalista kapableco, sed, sciuj tamen, Amiko Jung, ke ĵurnalisto devas nepre kapabli sciigi pri ĉio, ĉu per propra ĉeesto, aŭ, se li tion ne kapablis, per posta informo... sed tiam por la honoro de la ĵurnalistaro, ne decas ke li konfesu sian malpovon.

Kaj mi daŭrigas la legadon de via raporto... La Lundon, okazis en la Flandra Operdomo, grava okazintaĵo: Profesiaj aktoroj reprezentis la majstran tradukon de la glora elpensinto de nia lingvo, de la verko « Hamleto », de tiu alia genia aŭtoro Shakespeare.

Se io devis interesi la ĵurnalistojn precipe en la XXa Kongreso, devis nepre kaj speciale esti tiu ĉi reprezentado.

Kaj kion mi legas en via ĵurnalo pri ĝi :

« Mi nur bedaŭras, ke pro tro longa daŭro de la prezentado mi povis rigardi ĝin nur ĝis la granda paŭzo, ĉar je noktomezo mi devis, en la stacidomo, atendi du svedajn samideaninojn ».

Mi ege ĝojas pri la fakto, ke via simpatia vizaĝo inspiras al du niaj samideaninoj svedaj, la deziron vin renkonti je noktomezo en la centra stacidomo, sed vi tamen konfesos, ke estas ege bedaŭrinde, ke la raporto pri tia grava okazintaĵo, kiel internacia kongreso, dependu de tiaj malgrandaj deziroj inaj, kaj ke tio ankaŭ certe estas detalo, kiun vi certe ne estus publikiginta, se vi estus simpla ĵurnalisto, laboranta por direktoro. Plie, estas kvazaŭ insulto al la legantaro, tion publike konfesi.

Mi ne daŭrigos montri al la legantoj de « Belga Esperantisto », la malseriozecon de la raporto, kiun faris « Heroldo » pri nia XXa Kongreso. Vi tamen komprenos, ke la belaj laŭdaj vortoj, kiujn vi presis pri la membroj de L.K.K. kaj pri mi persone, ekzemple, havas ege akran kaj malbonan postguston, kiam ni spertis kun kia malseriozececo vi ilin skribas, kaj kiom malzorge kaj do necese malvere, vi informas vian legantaron en la mondo.

Sed repaŝtu ni nian brutaron...

Revenu ni al viaj plendoj:

1) La vivkostoj en Belgujo kaj la prezoj de la komunaj manĝoj. — Mi estas ege kontenta, ke vi elspezis tiom malmulte da mono en Belgujo. Mi bedaŭrus por via administrado, se la raporto, kiun vi verkis, estus kostinta al vi pli grandan sumon. Mi bone komprenas, ke vi manĝis je prezo pli malmultekostaj ol 10 belgaj frankoj, kiel diris la L.K.K. en Januaro 1928. Estas efektive en Antverpeno, je diversaj strat-anguloj

tion kion ni nomas « patatfritkraam », t.e. ĉaretoj, kie oni vendas bongustajn frititajn terpomojn (belga specialaĵo!) Mi konas eminentan samideanon kiu, ĉiufoje kiam li venas al Antverpeno, aĉetas en tia loko por unu franko da tiaj terpomoj, sed tiam li ankoraŭ malsatas, kaj iras vespermanĝi en restoracio. Si via persona stomako kontentiĝas pri tia malgranda porcio da terpomoj, des pli bone, sed « normala stomako » bezonas ordinare pli multe por satiĝi.

Kaj pri la kongresa festeno, kiu kostis 40 frankojn, ĉar estis festo, aranĝita speciale por ni, en salono, kiu ne estas restoracio, mi volas aldoni, ke private S-ro Merchant, kiu sidis flanke de mi ĉe la honortablo, konfesis, ke la prezo estis malmultekosta, ĉar li prekaŭ ĉiutage en Antverpeno pagis tiom en sia restoracio. Sed S-ro Merchant ne iris al « patatfritkraam »...

Konklude, ĉio, en tiu rilato, dependas de la personoj. La prezo de 10 frankoj, kiun L.K.K. sciigis en sia bulteno antaŭkongresa estis la ordinara prezo por ne eksterordinara mangaĵo. Des pli bone por tiuj, kiuj trovis taŭgan kaj bonan manĝaĵon je pli malaltaj prezoj.

2) La dislokiteco de la kunvenejoj. — Vi plendas ĉar vi loĝis ĉe la suda stacidomo; ka, ĉar la du ejoj, la akceptejo kaj la kunvenejo estis lokitaj je distanco de 10 ĝis 15 minutoj. Mi petas vin legi tion, kion pri tio diras la raportisto de « Esperanto ». Kiel skribite tie, tiu dislokiteco, tute malgranda tamen, estis bona, eĉ bonega je propaganda vidpunkto. Kaj ni tamen ne organizas kongresojn, por ke la publiko ne vidu nin.

Al tiu klarigo de « Esperanto », mi volas aldoni, ke kiam la Antverpena grupo: « La Verda Stelo », komencis en Septembro kaj komence de Oktobro, novajn kursojn de Esperanto, ĝi akiris pli ol 300 novajn lernantojn. Tiu ĉi fakto estas kaŭzata, ĉiuj pri tio konsentas, de la daŭra vido, dum unu semajno, en la ĉefaj stratoj de la urbo, de tiu milo kaj duono da samideanoj, kiuj iris de unu loka al alia, kun, fiere, sur la brusto, la kongresa insigno.

3) La labirinta enirejo de la Akceptejo. — Ĉiuj rimarkis ĉe l'eniĝo en la Akceptejo, ke la koridoro, kiu kondukas de la stratpordo al la salonegoj, ne estas rekta, sed prezentas du aŭ tri angulojn. Vi plendas speciale pri tio, kaj preskaŭ ne trovis la lokon. Mi nur povas respondi, ke tiu normala lernejo estis antaŭ la milito la « Deutsche Schule », kie studis la germanaj infanoj, tiam multnombre loĝantaj en Antverpeno. Tiu lernejo estis do konstruata de germanaj samtempuloj de vi kaj ni povas atesti, ke neniam antaŭ la milito la infanoj perdiĝis en tio, kion vi nomas la « labirinto ». Ankaŭ la belgaj infanoj, kiuj nun iras al tiu lernejo, ĉiam trovas la vojon senpene.

4) La urba plano kaj la ekskurso en la haveno. — La L.K.K. zorgis, ke la urbestraro disponigu en la Centro de la Urbo sufiĉe grandan nombron de policistoj Esp. parolantaj, por montri la vojon al la kongresanoj; plie ĝi faris sian eblon por ke estus en la akceptejo sufiĉe grava nombro de bone Esp.-scipovantaj samideanoj por doni ĉiujn klarigojn. Pri la eldono de plano ĝi ne studis, ĉar tio estas ege multekosta afero, kaj

estas nur lastmomente, ĉar la urbo disponigis al ĝi 2.000 grandajn planojn kun nacilingva teksto, ke ĝi kaptis la okazon por surprisigi sur ilin esperantajn klarigojn pri la gravaj monumentoj, kaj pri la tramlinioj. Mi kredas ke vi estas do la nura, por plendi pri la malgrand-literaj nomoj de la stratoj sur tiu plano.

La kritiko pri la boatekskurso povas ŝajni pli serioza. Kaj diversaj personoj povos eble konsideri la plendojn kiel pravaj. Ni tamen atentigas tiujn pri la fakto, ke ĉiu havis okazon vidi la Skeldon mem, apud la Steenpontono. Ke tiuj, kiuj deziris vidi la internan havenon, en la plena aktiveco de semajna tago, devas ankaŭ kompreni, ke havendokoj, ne estas promenado, kie oni povas enirigi luksboatojn por ekskursoj; ke estas tute escepte, por fremduloj, ke la urbestraro permesas la malfaciligon de la ordinara trafiko, per ekskurs-boatoj, kaj ke ĝi prenis do sur sin la tutan organizon de la senpagaj ekskursoj. Ni nur zorgis pri la ĉeesto de unu aŭ du samideanoj, por doni klarigojn, sed la ekskurso ne dependis de ni mem. Stopigi la trafikon en la havendokoj dum ok tagoj, ni kompreneble ne akiris, eble ĉar ni ne petis!

5) La fermhoru de la akceptejo. — Ĉiutage je la fermhoru restis kelkaj samideanoj en la akceptejo, kiujn ni devis peti foriri, kaj tiuj kelkaj kongresintoj tiam regule duonplendis pri la decido fermi la akceptejon je la 6a aŭ 6½ horo. Oni tamen prave jam atentigis en iu revuo pri la fakto, ke la L.K.K. bone faris, ĉar ĝi tiamaniere devigis la kongresanojn fari sian propran devon. Ĉiutage io okazis je la 8-a horo vespere, ĉu reprezentado, ĉu koncerto, ĉu balo, ĉu festeno kaj de la 6½ horo ĝis la 8a, ĉiuj nur havis la necesan tempon por iom manĝi; iomete purigi sian vestaĵon, kaj iri al la kunvenloko.

Iuj ankaŭ plendis pri la fakto, ke la poŝtoŝicejo estis fermita je tagmezo. Pri tio, mi povas respondi, ke la poŝtoŝicistoj estas regataj en Belgujo de la leĝo, pri la ok laborhoroj. Ke por tia escepta oficejo, oni ne kapablis fari interesanĝon de oficistoj dum du aŭ tri horoj de la tago, kaj ke oni do devis aranĝi la horojn kiom eble plej bone. Estis jam tutspeciala escepto, ke la poŝtoŝicejo povis resti malfermata dum la dimanĉa antaŭtagmezo. Same devas esti dirata pri la bankoficejo. Kaj pri la akceptejo mem, diru ni, ke, en tiu ĉi kongreso la akceptejo ne estis vere la renkontejo de la Esperantistoj. La renkontejo estis la Zoologia Ĝardeno, kiun la L.K.K. luis por la kongresanoj, aĉetinte por ĉiu el ili, abonkarton por la kongressemajno.

Kaj jen... mi respondis al ĉiuj kritikoj aperintaj en via semajna Esperanta revuo « Heroldo ». Kvankam mi respondis al ĉiuj, ne estas mia intenco, pravigi antaŭ la okuloj de la kongresanaro, ĉiujn aranĝojn de la L.K.K. Tio ne estas la celo de tiu ĉi artikolo.

Mi nur volis montri al vi, Amiko Jung, ke estas facile plendi, ke plendanto ĉiam trovas simpatiojn, sed ke tamen, ĉefredaktoro de revuo, kiu celas iĝi la ĉefa reprezentanto de la ĵurnalista fako en la Esperantomovado, devus nepre pripensi ĉiujn flankojn de la afero antaŭ ol skribi eĉ la malgrandajn plendojn, kiujn vi enŝovis en vian raporton.

Ke mi, tutsimpla ĵurnalisto, tion estus farinta en via revuo, tion oni povus pardoni al mi. La etulo ofte ŝatas venĝi malagrablejon, kiu okazis al li, kontraŭ kiu ajn, sed tio estas sento, kiun ni ne plu devus renkonti ĉe persono, kiu emas aparteni al la gvindanta klaso, al la gvindantaro de tiu granda Povo, Ĝia Gazetara Moŝto.

Estas jen malgranda peto de belga ĵurnalisto, ke, kiam vi ankoraŭ refoje eksterlanden iros, vi helpu teni alten la standardon de la Esperantistaj ĵurnalistoj. Je via sinteno, je via agmaniero, oni juĝos oftenian samideanaron.

Kaj kiam vi ankoraŭ venos al Antverpeno, ne plu iru al « patat-fritkraam » antaŭ noktmezo. Ne decas por kolego mia.

Mi respektplene, premas vian dekstran manon, kiu skribinte, dum-momente eraris, sed neniam plu rekomencos, ĉu ne?

Sen « pendumila humoro »

Via

Maur. JAUMOTTE.

PENTRINDA ANTVERPENO

LA ŜIPISTKVARTALO.

La ŝoseo de l' Fromaĝstrato supreniĝas per modera monto, en la ombro de l' larĝaj kaj altaj Hispanaj pintaj frontonoj. La strato turniĝas kaj turniĝas, kaj jen subite ekaperas la griza maso de la « Steen », la malnova fortikigita kastelo, kun siaj malmolaj senfenestraj muroj kaj siaj rondaj kovritaj aŭ dentaj turoj. Trans la balustrado de l' Willem Ogierplaco kuŝas la Skeldo, larĝe kaj trembrilante de lumo, malsupre de la alta ĉielkupolo, super la Flandra Bordo. Blankaj kaj brunaj veloj ŝveliĝas en la vento. La altaj korpoj de transmaraj ŝipoj malrapide moviĝas tra la riverego, dum la brun-nigraj fumnuboj ondsvarmas el la kamenoj kaj aŭdiĝas la kriegado de l'sirenoj.

De sur tiu altaĵo, kiu estas kvazaŭ digo, la plej malnovaj stratetoj malsupreniras denove en la urbon. Estas malimplikebla fadenvolvaĵo. Ĉiu strateto havas sian propran nedependan karakteron, ĉiu aldonas novan, kaprican linion al la komplikita arabesko de la senfine dividiĝanta stratbildo.

Kelkaj eĉ, (kiel la Segstrateto, kun sia bela kurbo kaj la lasta flavokre pentrita ligna ŝtupfasado), povis konservi sian tutan mezepokan karakteron. La rondaj, brunaj ŝtonoj de l' Krabstrateto malsupreniĝas al la kurbiĝanta Angilegponto, kiu daŭrigas sub la malhela, malalta arkaĵo de la alta Buĉistdomo en la Kastelfosaĵon.

La kurboj kaj fleksoj tiel rapidaj estas, ke post kelkaj paŝoj la aspekto tute aliĝas. Ĉi tie estas la malbonforme belaj dommasoj, la amasiĝoj de maldelikataj kamenoj kaj ege deklivaj seltegmentoj. La lumo estas krepuska dum mateno kaj vespero, inter la altaj kvazaŭ malleviĝantaj ŝtupfasadoj.

Mastodonte peza kusâs la malhelruĝa Buĉisthalo masonita inter tiuj domaroj. La vermokonsumitaj domaĉoj antaŭen klinas al tiu neŝkuebla ŝtona maso, kun siaj altaj turetoj, kiuj staras plantitaj en la tero, kvazaŭ flanke rabotitaj arboj, je firmigo de la konstruaĵo. La stratetoj rampas sub ĝi al la Kastelfosaĵo aŭ algrimpas per brun-pavimitaj ŝtupoj aŭ la deklivaĵo de l'Sangmonto, kiu supreniras al la granda kruco, kiu estas starigita inter la de-sufer-kuntiritaj bildoj de Mario kaj Johano ĉe la malnovaj muroj en la ombro de ŝirmanta tegmentaĵo.

Pli malproksime trans la S-ta Paŭloplaco kaj la S-ta Petrokanalo komenciĝas la vera ŝipistkvartalo. Estas nova araneaĵo de trairejoj kaj stratetoj ĝis Falconplaco, kiu larĝe malfermiĝas je senfina panoramo de doko kun la amaso de mastoj kaj ŝipkorpoj.

De tie kelkfoje venas tiuj strangaj aperaĵoj de Hindaj ŝipistoj, kiuj per malrapidaj piedoj dolĉe almarŝetas el siaj malproksimaj ŝipoj, per senbrua, ŝovanta paŝmaniero. Ili kondukas tra la griza strato la fremdlandecon de siaj diverskoloraj turbanoj, perlitaj ĉapetoj kaj koloraj ĉemizoj. Ili malgrasaj, flavaj manoj portas iom da pavplumoj, iom da malgrandaj rozaj konkoj kaj markornojn aŭ brilantajn silkajn ŝtofojn, kiujn ili, ie en la urbo, senparole vendprezentas, dum iliaj flav-mallumaj okuloj hele brilas en iliaj brunbruligitaj vizaĝoj.

Ĉi tie ankaŭ vagas la Polaj elmigrantoj, kiuj atendas la forveturon de siaj ŝipoj al Ameriko. Estas kolorriĉa, kompatinda vidaĵo: senbrilaj palaj virinoj, la kapo, korpo envolvitaj en la dikaj faldoj de verdaj aŭ ruĝaj ŝaloj; fortaj viroj kun altaj botoj kaj grizaj ŝaffeloj kaj la senhelpa mizerajaĵo de junaj infanoj, kiuj ĉiuj rapide antaŭenpasas kvazaŭ forkure kaj estas amasigataj kiel brutaro ie en alta, malluma domo proksime de l'Granda Placo. En la nokto ĉio aliĝas en ĉi tiu najbaraĵo. La malaltaj fenestroj flave lumetas sub la malhelaj fasadoj. La lumantaj anoncŝildoj ekbruliĝas, ruĝe kaj verde kaj blue kiel ŝiplanternoj, antaŭ ĉiuj « bars » kaj drinkejoj. Ili allogas la maristojn en ĉiuj mondaj lingvoj. La blankaj lumigiloj de la elektraj lampoj radias sian flavan aŭ purpurecan lumon blindigante antaŭ la kinematografejoj kaj dancejoj. Tie kaj tie sur stratangulo aŭ sur malluma placo brulas la kupraj lampoj malantaŭ la vitroj de « fritita terpom-ĉaro », kie bolanta graso ekvaporas.

Estas tra la strato svarmado de malhelaj fantomoj, moviĝantaj en la rebrilo el la fenestroj. Kafej-virinoj en koloraj bluzoj paradas en la pordaperturoj. Ĉie la orgenoj turnas siajn frenezajn dancojn. Estas konfuza bruo de klakantaj kastanjetoj, de sonantaj tamburoj, de orgentuboj kiuj tede eligas altajn kaj profundajn tonojn, inter la sonorado de « trianguloj » kaj la « ĉzim »-ado, « bum »-ado de platoj kaj cimbaloj. Meze de svarmado kaj bruado aŭdiĝas ĉe anguloj la flustraj petoj de lornete rigardantaj virinoj. Pezaj « matronoj » kapĝestas el la portaloj de suspektaj domoj.

Dume okazas la fantaziaj, burleskaj kaj sentimentalaj reprezentadoj en la Pulĉinela Kelo, ĉe la Buĉisthalo. Geinfanoj kaj Antverpenaj

doklaboristoj el la najbaraĵo malsupreniras kapklinante la ŝtonan ŝtuparon en la duonluman kelenirejon. En la blu-vaporanta tabakaero, sub la rozkolora malalta arkaĵo, ili sidas amasigitaj sur ŝtupforme rabotitaj bretoj. Ĉiuj kapoj antaŭenkliniĝas al la malalta kaj mallarĝa scenejo, kie la lignaj pupoj en koloraj vestaĵoj moviĝas per feraj stangoj antaŭ la primitivaj dekoracioj, prezentantaj tutajn arbarojn kaj urbojn kaj reĝajn palacojn kaj marojn kun rabistaraj ŝipoj. Laŭtaj virvoĉoj en suka Antverpena idiomo interpretas la amsopirojn de ĉagreniĝantaj princoj, la komandojn de militestroj, la blasfemon de « l'Nazulo », la « Kapulo », la « Strabulo » kaj la « Grizulo », kiuj estas enkarceritaj ĉe la Fajradorantoj aŭ venas kun siaj kamaradoj en la kortegon de l'Reĝo de Majorko aŭ Arabujo.

Kaj kiel vere Hispan-asketa antitezo suprenleviĝas tie en la koro de tiu frenezema ŝipankvartalo la alta Kalvarimonto de l' Sankta Paŭlopreĝejo.

Dum la stratoj svarme pleniĝas je popolo, dum la fenestroj flave lumbrulas, dum okazas la subteraj ludoj, oni ekkonas tie en la krepusko de l'nokto, ĉe l'alta preĝejnavo, sur nigra rokeca fundo, la ŝtoniĝintan misteriludon de l'sufero de Kristo. Tie staras la grandioza statistaro, ĉiuj la profetoj de l' Malnova Testamento, kiuj antaŭdiris la amaran Pasion. Plorantaj anĝeloj portas la turmentilojn kaj, en la profundaĵo estas la malhela kaverno kun la Sankta Tombo kaj la reprezento de l'Purgatorio: vivgrandaj figuroj de viroj kaj virinoj kun dikaj larmoj sur siaj de-suferado-kuntiritaj vizaĝoj en turniĝo de ruĝaj brulegantaj flamoj, malantaŭ dikaj feraj stangoj.

Tra fendo de l'tombŝtono, fermitaj per ruĝaj sigeloj, oni vidas la kadavron de Kristo kun Lia dornokrono kaj la sanga vundo en la flanko. Je ĵaŭdo Sankta la homoj venas tie surgenui kaj preĝi kaj tiam blanka punta tuko kuŝas sur la nuda, morta Jesuo kaj tremanta lumileto brulas en la malluma tombo. Pli alte en la nigraj kavernoj Mihaelo batalas kontraŭ Lucifero kaj genuas Dominikanoj, antaŭ Piëta, dum sur la rokeca montsupro estas plantita la kruco kun la mortanta Kristo inter Mario kaj Sankta Johano.

Tiuj kompatindaĵoj de l'Purgatorio estas kvazaŭ konstanta brulejo, « autodafe » de l' Sankta Ofico de l'Dominikanoj, kiuj havis sian monahinejon ĉi tie en pli fruaj tagoj. Kaj estas teruriga penso scii, ke dum turniĝas la freneze kirliĝantaj dancoj en bruplenaj salonegoj, dum estas ĉi tie satigataj la plej bestaj ĝuoj, dum estas diboĉata kaj drinkata... la malvarma ŝtona kadavro de Kristo tie kuŝas senmove tra ĉiuj la abomenaj noktoj, tiel home morte kaj rigide, kun la purpura vundo en la flanko kaj la palflava kapo perlita de ruĝe malfluidiĝinta sango.

El « La Vivanta Antikva Antverpeno » de JOZEF MULS,
tradukis TYNEVERUM.

BELGA KRONIKO

AALST (ALOST). — La loka Esperanto-grupo organizas novan kurson, kiu okazas dufoje ĉiusemajne en la komunuma lernejo n° 1. La profesoro estas S-ro Rob. De Bondt. En Januaro proksima S-ro Rob. De Kegel, Sekretario de la grupo, organizos specialan kurson de Esperanto per fonografaj diskoj.

ANTVERPENO. — « La Verda Stelo ». — Sabaton 6an de Oktobro ni havis kiel kutime la Ĝeneralan monatan kunvenon. Sabaton 13an gramofonkoncerto estis organizata en la sekretariejo. Tie Gesroj Faes aŭdigis diskojn de klasika muziko ankaŭ amuzajn kantojn k.t.pl. Ege granda aŭskultantaro venis.

Sabaton 20an ni havis por la unua fojo en tiu ĉi sezono kantlernadan vesperon, kiun lerte gvidis F-ino Cortens.

Sabaton 27an S-ro Faes paroladis pri Schubert, la fama muzikisto, kiun dum tiu jaro oni speciale festas en ĉiuj landoj okaze de la centjara datreveno de lia morto.

Dum la monato Oktobro « La Verda Stelo » malfermis sian sepan kurson de la sezono. Ĝi estas gvidata de S-ro Boeren. Enskribiĝis 41 kursanoj.

Jaŭdon 8an de Novembro « La Verda Stelo » malfermis la okan kurson de la sezono. Ĝi estas flandralingve gvidata de S-ro Vermuyten. Ĉeestis la malfermon de la kurso 27 personoj. La Grupa Membraro atingis la belegan nombron de 660. Dank'al la Kongreso, dank' al la tuja klopodado de la propagandistoj tiu bela rezultato estas akirita.

Sabaton, 10an « La Verda Stelo » invitis siajn membrojn partopreni la dancfeston, kiun ĝi organizis en la belega salono « Gymnase ». Tiu unua balo de la sezono estis granda sukceso. S-ro Kempeneers el Bruselo bonvolis ĝin ĉeesti.

Dum tiu dancfestoj S-ino Bornstein bonvolis kanti du muzikaĵojn kaj F-ino Annabelli, juna dancistino 9 jara dancis laŭ klasikaj muzikaĵoj. La aplaŭdoj de ĉiuj ĉeestantoj rekompencis ambaŭ. La Prezidanto S-ro Jaumotte je la nomo de la Grupo prezentis florojn.

Sabaton, 17an: Nia Vic-Prezidanto S-ro De Ketelaere faris tre interesan paroladon pri « VULKANOJ ». Lumbildoj ilustrantaj la paroladon montrigis diversajn vulkanojn de Eŭropo, Hindujo, Ameriko, Japanujo.

Sabaton 24an: S-ro Ameryckx, legis al ni redakton, kiun li faris laŭ temo « Impresojn dum promenado » kaj la aplaŭdoj pruvis, ke li bonege sukcesis interesi le membrojn.

Urbaj vesperkursoj. — En la kadro de la oficialaj vesperkursoj okazas ankaŭ nunjare kvar kursoj (du studojarojn). Sekvas ilin 61 personoj. La profesoroj estas: S-roj Rob. Broeckhove, J. Karnas, Const. Schroeyers kaj J. Vereeck.

Laborista Popola Universitato. — La programo de ĉi tiu institucio enhavas, kiel la du antaŭajn jarojn la organizon de Esperanto-kurso. La enskriboj estis tiom multnombraj, ke starigo de du klasoj estis necesa. 90 lernantoj sin prezentis en tiuj du klasoj gvidataj de S-ro Em. Wille-

kens kaj S-ro Is. Van Praag. Perfektiga kurso ankaŭ funkcias sub gvido de S-ro Em. Willekens.

La propaganda kaj turisma societo « Antverpeno-Antaŭen », kiu tiel efike helpis la L. K. K. de la 20a kongreso, malfermis novan oficejon kun ekspoziciejo en salono « NOVA », Frankrijklei 36 (Avenue de France 36). La unua ekspozicio organizita en tiu salono, publike kaj senpage vizitebla, estas tiu de turismaj kaj foiraj afiŝoj. Tuta fako de afiŝoj redaktitaj en Esperanto multe impresis la vizitantojn kaj sendube tiu elmonro de la praktika uzado de nia lingvo tre helpas la propagandon de ĝi. La ekspozicio daŭros ĝis la 6a de Januaro 1929.

La 10an de Januaro komenĉiĝos alia ekspozicio pri komercaj afiŝoj, prospektoj kaj specimenoj. Ni petas niajn belgajn kaj eksterlandajn samideanojn, ke ili alsendu al la suprecitita adreso ĉiun koncernan materialon en Esperanto, kiun ili povus havigi. Nia partopreno en tiaj organizoj plej efike daŭrigas la propagandon por Esperanto en la urbo de la 7a kaj de la 20a Kongresoj. Antaŭdankon al ĉiuj kunhelpantoj!

Sindikato de Komercaj kaj Industriaj Oficistoj. — Laŭ peto de la grupo « La Verda Standardo », la Oficista Sindikato anoncis inter siaj lingvaj kursoj kurson de Esperanto ĵaŭde vespere. Sin prezentis 15 lernantoj, kiuj nun sekvas la kurson, kiun gvidas S-ro Morris De Ketelaere, en klaso de la Instituto S-ta Norberte, kie okazas ĉiuj vesperkursoj de la citita Sindikato.

S-ta Ignaco-Supera Komerca Instituto. — Post enkonduka parolado de S-ro Morris De Ketelaere sin enskribis 40 komercaj studentoj por libera vespera kurso de Esperanto, donata ĵaŭde vespere de la 7 $\frac{3}{4}$ ĝis 8 $\frac{1}{4}$ h. en klaso de la Instituto. Tiu kurso daŭros ĝis Pasko 1929.

BRUSELO. — Brusela Grupo Esperantista. — Dum la ĝenerala kunveno de la 10a de Septembro, la Grupo decidis ŝanĝi la kunvenejon por ke oni denove povu kanti kaj danci eĉ, dum la kunvenoj.

La 16an de Septembro ni partoprenis en ekskurso de la Antverpenaj samideanoj al Tamise. Post intima manĝado en Tamise, la esperantistoj grupe promenadis de Tamise al Rupelmonde kie, je la 6 $\frac{1}{2}$ vespere, ili ĉiuj reenŝipiĝis por reveturi Antverpenon.

La 22an de Oktobro okazis la jara-ĝenerala kunveno de la Grupo por la reelekto de la Komitato. Estis elektitaj: S-inoj Biesterfeld kaj Obozinski, S-ro Kempeneers, Bas, Brihay, Castel, Spielfiedel. La Komitato, dum sia unua kunveno nomis: S-ron Kempeneers, kiel prezidanton, S-ron Bas, kiel vic-prezidanton, S-ron Brihay, kiel Sekretarion, S-ron Spielfiedel, kasiston.

La 31an de Oktobro, la Grupo aranĝis sian unuan grandan propagand-feston kiu bonege sukcesis. Je la 7 $\frac{1}{2}$, intima vespermanĝo kunvenigis ĉirkaŭ kvardek samideanojn oni manĝis, oni babiladis, oni ridis kaj oni tre bone amuziĝis.

Je la 9a okazis la vera festo: la pianoforto aŭdiĝis la «Espero'n»; poste la Prezidanto, D-ro Kempeneers faris mallongan paroladeton por montri kiamaniere la kursoj de la pasinta vintro bone sukcesis kaj diris ke Brusela Grupo baldaŭ komencos diversajn kursojn en Bruselo, en

Taverne Royale

Rue d'Arenberg, Galérie du Roi

BRUSELO

Unuaranga entrepreno.

Restoracio — Kafejo — Tetrinkejo.

Grandaj kaj malgrandaj salonoj por Festenoj,

Kunvenoj, Konferencoj, k. t. p.

— — ARANĜO DE HEJMAJ FESTENOJ. — —

SCHIDLOF's ZAKWOORDENBOEKJE

Esperanto-Nederlandsch & Nederlandsch-Esperanto

1 volumo : 600 paĝoj - Fr. 18.50

Mendu ĉe **Belga Esperanto-Instituto K. S.**

Poŝtĉeko 1689.58

ANTVERPENO.

HUIS IRMA

GER. DE BOES-BUTTENAERE

ALTA KUDRADO

ROBOJ - MANTELOJ - PELTOJ

POŬTĈEKO 148 186

Wijnstraat, 31, RONSE.

ESPERANTO PAROLATA KAJ KORESPONDATA.

VIZITU BRUGES (BELGUJO)

arta urbo je 15 Km. de la Norda Maro

kaj haltu :

HOTEL DU CORNET D'OR

2. PLACE SIMON STEVIN

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista.

Centra situacio je 2 minutoj de la Stacidomo.

Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj, bonaj vinoj kaj tre moderaj prezoj.

Oni parolas Esperanton.

English spoken.
(106) S. D.

Banque Générale de la Flandre Occidentale

Anonima Societo fondita en 1881

56, Rue Flamande, 56 — BRUGES — Telefono 89

Agentejoj en

Blankenberghe, Furness, Ghisteltes, Heyst, Knocke, Nieuport kaj Thourout.

DISKONTO

MONSANGO

KREDITKONTOJ

Pruntedono sur obligacioj kaj ĉiuj valordokumentoj — Depono de Akcioj

Borsmendoj por ĉiuj urboj.

ANTAŬMENDOJ—REGULIGOJ

Pago de kuponoj — Eldono de ĉekoj — Kreditleteroj

Aĉeto kaj vendo de fremdaj mono kaj biletoj — Luigo de monkesto.

(105) S. D.

Telefono:
Cappellen 103.

AŬTOMOBILTENEJO.

Poŝtĉekkonto
No 1178.56.

Grand Hôtel de la Chapelle St. MARIABURG

G. VAN HAVER-DE BOES

RESTORACIO LAŬKARTE — FAMILIA PENSIONO

SALONEGO POR FESTOJ KAJ FESTENOJ.

MALFERMATA DUM VINTRO KAJ SOMERO.

NB. Facile atingebla el Antverpeno per aŭtobuso aŭ tramo. NB.

Esperanto parolata!

Esperanto korespondata.

Ixelles (en postlerneja klubo por junuinoj), en Laeken, en postlerneja klubo por junuloj, sendube en Uccle.

Fininte sian paroladeton, la Prezidanto anoncis la disdonon de la diplomoj al la premiitaj lernantoj de la lastaj kursoj. Oni vokis dekkvin gelernantojn, kiuj sukcesis la ekzamenojn.

Post la disdono, S-ro Schoofs, Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, kiu bonvolis partopreni tiun festeton kun kelkaj antverpenaj samideanoj, gratulis la sukcesintajn lernantojn kaj dum mallonga paroladeto montris kiamaniere, ĉiam multe laborante, la Brusela Grupo triobligis dum nur unu jaro la nombron de siaj membroj.

Li speciale gratulis D-ron Kempeneers pro lia sindonema propagando de nia afero kaj pro la granda helpo, kiun li alportis kun siaj bruselaj amikoj al la organizintoj de la Antverpena Universala Kongreso dum la lasta somero.

F-ino Jacobs, el Antverpeno poste kantis Esperante kaj rikoltis multe de aplaŭdoj. Poste venis prestidigitatoro kiu, dum duono da horo multe interesigis la publikon per diversaj ĵonglaĵoj kaj iluziaĵoj. Li estis treege aplaŭdita.

Kaj la vespero finis per mallonga balo, dum kiu la junuloj, sufiĉe multnombraj, povis danci kiel eble plej multe.

Tiun feston partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj. Ĉar estas la unua festo publika kiun tiu grupo aranĝis, ni povas diri, ke la sukceso estis tre kuraĝiga kaj ni esperas, ke la Bruselaj samideanoj ankoraŭ ofte organizos similajn festojn.

En Novembro speciale citinda estas la interesege parolado, kiun faris D-ro Kempeneers pri sia vojaĝo tra Svedujo, kie li restadis dum tri semajnoj. Li klarigis multe pri la vivo, la kutimoj, en tiu norda lando kaj montris kiom li estis tie helpata de Esperanto.

Li klarigis ke nek per la franca lingvo, nek per la germana li povis komprenigi sin de la svedoj.

« Se mi ne estus havinta niajn esperantojn, mi certe estus mortinta, ĉar tute ne kapablis mendi ĉu glason de biero, ĉu manĝaĵon ».

Ni atentigas pri tio ke la Brusela Grupo nun kunvenas ĉiulunde, je la 8½ en « Brasserie Flamande » — unua etaĝo — 24 rue Auguste Orts (apud la Komerca Borso).

Kurso el «Radio-Belgique». — Je la 21a de Oktobro komenciĝis la 3aj perradiaj kursoj de Esperanto organizataj de « Belga Ligo Esperantista ». Tiuj kursoj okazas regule ĉiumerkrede: en franca lingvo, je la 18a horo, gvidata de S-ro D-ro Paul Kempeneers, en flandra lingvo, je la 18 h. 15 gvidata de S-ro Lod. Bas. Konstatinte mendon de kelkcentoj da lernolibroj ni povas noti bonan sukceson de la novaj kursoj. Tiu sukceso povus certe esti pli granda, se la Estraro de Belga Ligo akirus konsenton pri organizo je alia, iom pli malfrua horo. Ĝis nun la Direkcio de la stacio « Radio-Belgique » ne trovis rimedon por plenumi la peton de nia Ligo.

Universitata Esperantista Grupo. — La 15an de Nov. S-ro Durieu parolis en la « Hejmo de l'Studento » pri « La Franca Socio dum la 19a jarcento ».

— **BRUGO.** — La 1an de novembro la grupo partoprenis, kiel ĉiujare, en la sekvantaro organizita de la «Invalidaj Soldatoj» por iri al la milittombejo saluti la militmortintojn.

GENTO. — Nova kurso okazas ĉiumerkrede por ĉirkaŭ 25 gelernantoj.

KORTRIJK (COURTRAI). — Sabaton, 6an de Oktobro, S-ro L. Cogen, vicprezidanto de la Belga Ligo Esperantista, faris multefikan paroladon en la festsalono de la urbdomo. Ĉeestis 120 personoj.

La loka gazetaro plej favore raportis pri S-ro Cogen, kies elokventeco konvinkis la tutan aŭdantaron pri neceso de helplingvo kaj la taŭgeco de Esperanto por tiu celo.

Estis tre valora vespero por la loka movado, kiu certe havigos al ĝi aron de novaj samideanoj.

La sekvontan dimanĉon, laŭ invito de la tiea grupo, la Kortrijk-aj esperantistoj ekskursis al Roubaix (Norda Francujo).

La urbestro akceptis ilin en la urbdomo kaj prezentis la honorvinon. Tre favore al nia movado parolis la urbestro, atentante precipe pri la paca celo de Esperanto.

Vere estis bonefika tago por nia movado en tiu industria centro, kie Esperantismo ĝis nun pene vivadis.

En ĝia kunveno de Lundo, 8an de Oktobro, la urbkonsilantaro de Kortrijk havigis al la loka grupo monsubtenon de 750 fr. por starigo de novaj kursoj kiujn gvidos S-ro R. Groverman, advokato el Gentbrugge-Gent. Tiuj kursoj okazos en la ĉambrego de la urbdomo kaj komenciĝos la 8an de Novembro.

Tio estas grava helpo por la grupo kaj permesos novan antaŭenpuŝon al vojo de sukceso.

LIER. — Nova kurso malfermiĝis la 25an de Novembro en la mezagrada lernejo por knaboj. Profesoro estas S-ro Schroyers.

SANKTA NIKOLAO. — La 7/11/28 malfermiĝis nova kurso por 23 partoprenantoj, gvidata de S-ro Van Gendt. Perfektigan kurson gvidas S-ro De Clippeleir.

La grupa sekretario estas nun: Wegvoeringstraat, 75.

La gemembroj de la grupa bicikleta sekcio «Verda Rado» sendu de nun al la Sekretariino proponojn por ekskursoj dum la venonta somero.

TIRLEMONT. — La grupo daŭre propagandas kaj baldaŭ malfermos novan kurson.

VERVIERS. — La 7an de Oktobro okazis apud la farmodomo «Marie-Thérèse», je kelkaj metroj de la vojo al Jalhay, la inaŭguracio de la monumento al Joseph Parotte, iama prezidanto de la Verviers'a Grupo Esp. kaj delegito de UEA, kiu por ĉiam endormiĝis en tiu loko mem sub la senmakule blanka neĝo la 6an de Decembro 1925. La parencoj kaj la amikoj ĉeestis multnombre la ceremonion; la plimulto de la membroj de lokaj ekskursocietoj venis, kelkaj per aŭtomobiloj sed granda nombro ankaŭ ne hezitis piede entrepreni tiun pian pilgrimadon.

Paroladoj estis diritaj de S-ro Albert Bonjean, prezidanto de la

komitato por la monumento, S-ro Comhaire, vice-prezidanto de « Vieux-Liége », S-ro Peuteman, prezidanto de la Verviersa Societo de Arheologio kaj Historio, S-ro Van de Lanoitte por la Scienca Rondo, S-ro Duesberg, literaturisto. S-ro J. Hérion, nuna prezidanto de la Esp. Grupo de Verviers, per belega, altanima parolado alportis la homaĝon de la esperantistoj al la memoro de la kara mortinto, kiŭ dediĉis pli ol 20 jaroj de sia vivo al la progresigo de nia movado. Per belstilaj frazoj samideano Hérion citis la altajn spiritajn kvalitojn de Joseph Parotte. « Li tamen restos inter ni. Lia vivo estis tro intime ligita al la nia, por ke li lasu al ni nur iun vaporsimilan memoraĵon. Ni ja ne estis preparitaj al lia morto kaj tial lia spirito trankvila ŝvebas en la kampo de nia aktiveco. Li nin gvidas, nin inspiras kaj blovetas en nin la emon lin imiti ».

La monumento estas grandega unupeca kvarcito malkovrita en fosaĵo apud la vojo. Ĝi pezas trimiĉ kilogramojn kaj 15 homoj helpataj de aŭto-trenilo estis necesaj por eltiri ĝin el la ŝlimo en kiu ĝi kuŝis de nememoreblaj tempoj. Sur la rokŝtono estas ĉizitaj la vortoj: « A Joseph Parotte, mort en Fagne, dans les neiges, le 6/12/1925 ».

Pri tiu emociplena ceremonio la lokaj ĵurnaloj dediĉis longajn artikolojn.

Multaj fakaj gazetoj enhavis dum la lasta tempo artikolojn pri kaj por Esperanto. Ni citu nur, krom la « Diamantbewerker » (kiu ne preterlasas la plej malgrandan okazon por favori nian movadon), « De Stroom », organo de la Internacia ordeno de Bontemplanoj, « Algemeen Blindenverbond van Vlaanderen », « De Scout », « Ons Streven » gazeto de la « Politieverbroedering » de Granda-Antverpeno. Specialan noton meritas « De Lichtbaak » organo de Instrua instituto per korespondado « Excelsior », el Loveno, kiu publikigas kurson pri nia lingvo.

GRATULOJ.

Al S-ro kaj S-ino C. Vandeveld-De Kneef, komitatano de Belga Ligo Esp., Gentbrugge, al kiuj naskiĝis fileto, Paul, la 28an de Septembro.

Al S-ro kaj S-ino H. Vermuyten-Lacroix, komitatano de « La Verda Stelo », Antverpeno, al kiuj naskiĝis filineto, Estella, la 6an de Oktobro.

Al Gesinjoroj Dés. Leflot, membro de « Liera Stelo », Lier al kiuj naskiĝis fileto Jozef.

Al S-ro Prof. René Mesny, Direktoro de la Nacia Laboratorio de Radio-elekto, Parizo, kiu estas nomita honora membro de la Belga Federacio de l' Societoj de Radioelektraj Studoj pro liaj gravegaj servoj al la radio-afero.

NEKROLOGO.

S-ino Marie Louise Gamar, patrino de S-ro Nicolas Van Winge, membro de « La Verda Stelo », Antverpeno, mortis en Antverpeno la 16an de Novembro.

Ni prezentas al nia samideano kaj al lia edzino niajn plej sincerajn kondolencojn.

BELGA LIGO ESPERANTISTA.

EKZAMENO PRI PROFESORA KAPABLECO.

Ekzameno pri profesora kapableco okazis en Antverpeno dimanĉon, 21an de Oktobro 1928.

La juĝantaro konsistis el F-ino Jennen, S-ro C. Van de Velde kaj Oscar Van Schoor. Tiu lasta anstataŭis S-ron Cogen, malhelpita.

Ses kandidatoj partoprenis la ekzamenon.

Sukcesis: S-roj M. Boeren, W. De Schutter, P. Kempeneers, F-ino G. Kenens kaj S-ro I. Van Praag.

S-ro Van Regenmortel, tro juna (nur 17 jara) por esti diplomita pri profesora kapableco, interkonsente kun la grupo « Verda Stelo », ricevos la diplomon pri simpla kapableco. Kiam li estos sufiĉe aĝa li povos sin reprezenti senpage al ekzameno pri profesora kapableco.

« Belga Ligo Esperantista » prezentas al la novaj profesoraj siajn plej korajn gratulojn kaj deziras plej bonan sukceson al la kursoj de ili gvidotaj.

LA POSTO DUM LA 20a KONGRESO.

Ni povas doni al niaj legantoj kelkajn statistikajn ciferojn pri la operacioj de la speciala poŝtoŭicejo organizita en la Akceptejo de la Kongreso en Antverpeno.

Dum la 10 deĵortagoj la vendo de poŝtmarkoj atingis la sumon de Belg. fr. 28.249,47. Estis vendataj interalie: 10505 poŝtmarkoj po 0,35, 11682 po 1,00, 4301 po 1,75, 1100 po 0,05, 200 po 0,10, k.t.p.

Estis forsendataj el tiu oficejo almenaŭ 30.000 poŝtkartoj kaj leteroj, kaj disdonitaj proksimume 6.000 poŝtaĵoj.

Krom tio estis forsendataj: 21 rekomenditaj leteroj; alvenis 19.

Nur 3 ekspressendaĵoj kaj 7 per aerpoŝto estis deponataj en la oficejo.

Neniu poŝtmandato estis farita kaj nur 2 mandatoj kaj 2 poŝtĉekoj estis elpagitaj.

La deponitaj korespondaĵoj estis forsenditaj 4 foje en ĉiu tago; je la 9 h. 30, 12 h. 15, 15 h. 30 kaj 17 h. 15. Kvarfoje ĉiutage, aparta oficisto prenis el la Centra poŝtoŭicejo de Antverpeno la korespondaĵojn alvenintajn por la kongresanoj, nome je la 8 h., 9 h. 30, 14 h. kaj 15 h. 30.

Je la definitiva fermo de la oficejo restis proksimume 350 korespondaĵoj kiuj estis forsenditaj, ĉu al la adresoj indikitaj de la kongresanoj mem al la oficistoj, ĉu al la adreso notita sur la aliĝilo.

La L.K.K. deziras ĉi tie esprimi sian grandan dankon al S-ro Van Bellegem, Direktoro de la Poŝtservo Antverpeno-Limburgo, pro la bona organizo de nia kongrespoŝto, kaj al niaj samideanoj S-roj Daems kaj Van Goethem, poŝtoficistoj, kaj S-ro Van Dingenen, leterportisto, pro la sindonemo kaj afableco kiujn ili elmontris dum sia deĵoro kaj pro la servoj ĉiuspecaj faritaj al niaj alilandaj gastoj.

FOTOGRAFAĴOJ PRI LA 20a KONGRESO.

Malgraŭ nia peto en la Julia numero de B. E. ne multaj samideanoj respondis al nia alvoko pri sendo de fotografiaĵoj faritaj dum la Ant-verpena kongreso kaj dum la postkongresa ekskurso tra Belgujo. Ni permesas al ni ĉi tie renovigi nian peton.

Ni intencas fari kolekton de kongresaj lumbildoj sur filmo projekciebla per aparato «Fotoskopo» aŭ simila. Tial ni kompreneble bezonas kiom eble plej multe da fotografiaĵoj. La formato ne gravas, sed jes la klareco. Al ĉiu bildo oni bonvolu aldoni (ne surskribi) klarigon kun dato kaj loko. Se eble oni sendu la fotografiaĵojn antaŭ la fino de Januaro 1929. Rekompence ni sendos kopion sur filmo.

Nian koran dankon ni nun jam esprimas al tiuj nemultaj amikoj kiuj plenumis nian deziron, nome al S-ro Darĵus Nemseĉi, el Tabriz, S-ro Charles Chomette, el Nov-Jorko, S-ro C. Goldsmith, el Londono, Ges-roj P. Merrick, el Shepperton, S-ro G. W. Wight, el Edinburgo, S-ro John Merchant, el Sheffield, S-ro Albéric Humez, el Douai.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Belga Teritorio.

Insiste mi alvokas la membrojn de UEA, ke ili pagu senprokraste sian kotizon por la jaro 1929. Tute escepte la Komitato de UEA konsentis doni la premion de frua pago al ĉiu membro kaj al ĉiu membro-abonanto, kiu sendas sian kotizon antaŭ le 31a de Januaro 1929. La kotizoj por Belgujo restas kiel en 1928: membro fr. 16.; membro-abonanto fr. 40,—; membro-subtenanto fr. 175.

Al multaj petoj ricevitaj mi respondas, konfirmante ke la premio de frua pago ankaŭ estas donata al la nov-aligantoj.


Apartan premion ricevas la varbanto de nova membro. Detalojn enhavas la rozkoloran admonilon pri repago de la kotizo por 1929, kiu estis dissendita al la membroj antaŭ kelkaj semajnoj.

Fr. SCHOOFs, Ĉefdelegito.

POR LA FILATELISTOJ.

La Belga Nacia Komitato kontraŭtuberkuloza eldonis 6 belajn poŝtmarkojn kun aldono je la profito de sia bonfara celo.

La valoro de la diversaj markoj estas: 5 Cm. - 5 Cm., 25 C. - 15 Cm., 35 Cm. - 10 Cm., 60 Cm. - 15 Cm., 1 Fr. 75 - 25 Cm., 5 Fr. - 5 Fr.



La tuta kosto de la plena kolekto estas 13 Fr. 70. La markoj restas validaj por afranko ĝis la 30a de Junio 1929 kaj estas aĉeteblaj en ĉiuj poŝtoficejoj de Belgujo.

La alilandaj samideanoj, kiuj deziras ricevi tiujn markojn bonvolu sendi al Belga Esperanto-Instituto, Antverpeno, la koncernan sumon, aldonante 3 Fr. 50 por rekomendita afranko per ordinariaj poŝtmarkoj, aŭ 4 Fr. 50 per la bonfaraj markoj. Ili prefere pagu per poŝtmandato aŭ per ĝiro al poŝtĉekkonto N-ro 1689.58.

DIVERSAJ INFORMOJ

Internacia Esperanto-Muzeo, en Vieno estas kontrakte starigita kiel « Corpus separatum » (kolekto aparta) de la Nacia Biblioteko, kiu traktos kaj administros ĝin kiel la havaĵojn akiritajn de ĝi mem. La malfermo okazos la 30an de Julio 1929 antaŭ la 21a Esperanto-Kongreso en la festsalono de N.B. en « Hofburg », la iama imperiestra kastelo. La Loka Kuratora Komitato de la Muzeo petas alsendon de kiu ajn Esperanto-materialo: libroj, gazetoj, propagandiloj, fotografajoj, prospektoj, poŝtkartoj, kt.p.

Esperanto en Aŭtomobilistaj kaj Motociklistaj societoj. — S-ro Karl Knoll, Theodor-Körner-Allee 11,1, Zittau i/Sa. (Germanujo), deziras starigi movadon por la enkonduko de nia lingvo en la ĉiulandaj societoj de aŭtomobilistoj kaj motociklistoj. Pro la rapidege kreskanta internacia trafiko de motorveturiloj li supozas, ke post nelonge kelkaj post kelkaj naciaj aŭtokluboj ekkonos la mondlingvan aferon kiel sian propran kaj mem postulos kaj helpos la ĝeneralan enkondukon de nia lingvo. Gesamsportanoj interrilatu kun li por eventualaj proponoj. Poste li sendos rekte al ili novajn informojn.

« Hitherwood » estas la nomo de Internacia Gastejo en Londono, kiun rekomendas kelkaj geamikoj al la Esperantistoj, kiuj intencas viziti Londonon je malgranda kosto. Estas tie sento de tutmonda amikeco kaj la situacio de la gastodomo estas tre tauga por vizitanto kiu deziras vidi la plej interesajn vidaĵojn de la brita ĉefurbo. La Estraro eldonis Esperante-redaktitan prospekton kiun oni petu ĉe la adreso: « Hitherwood », 19, Sydenham Hill, Londono, SE. 26.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (K. E. L. I.) — Dum la 20a Kongreso de Esperanto en Antverpeno la K. E. L. I., kiu estas starigita sur evangelia kristanismo, decidis, denove komenci viglan agadon. Kiu povas helpi je la disvastigo de Esperanto inter la kristanaro, estas petata sendi proponojn, monhelpojn kaj aliĝon al la ligo. Jarkot. minimume 1 ŝilingo (angla). Oni adresu al S-ro Paul Hübner, Bergstrasse 1a Quedlinburg (Germanujo) au al S-ro C. A. Fairman, 24, Binfield Road, Londono S.W. 4. (Anglujo).

Belga Manufakturo de Industriaĵoj

Societo anonima (Fondita en 1872)

18, RUE NEUVE, 18 LEDEBERG - APUD - GENTO

TELEGRAF-ADRESO: " PERFECTA ,, GENT

TELEFONO: 635

Dozitaj analiziloj por la uzado de la industriaĵoj.

Logika purigo per purigaj aparatoj aŭ en kaldronegoj kun aŭ sen aparatoj.

Senpera importado de industriaĵoj kaj grasoj.

Stupo. Kauĉuko. Klapoj. Rimenoj.

Kotonrestaĵoj por purigi maŝinojn.

(107)

EKSPORTADO



CIF AL ĈIŬJ HAVENOSJ

Niaj asbest-cementaj ardezoj, platoj ebenaj kaj ondoformaj multe uzataj estas por kontraktoj de la

Belga Ŝtatlervoja estraro:
TIO GARANTIAS ILIAN BONEGAN KVALITON

Fabrikejo de Gipso - Cementaj Tegoloj kaj Kaheloj
Brikoj - Ter-tegoloj - Flandraj argilaĵoj

Scheerders - Van Kerchove's

VEREENIGDE FABRIKEN (*Naamlooze Vennootschap*)

SINT-NIKLAAS (Waas) - Belgujo

(120)

Ĉu pri via URBO

jam ekzistas ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ kun ambaŭflanke klariga Esperanto-Teksto ?

Se ne. Rememoru la belajn seriojn pri Antverpeno, Bruselo kaj Bruĝo, kiujn vi admiris dum la 20-a Universala Kongreso de Antverpeno.

Vi, via grupo aŭ societo povas favore akiri samajn kun vidaĵoj de via urbo.

Petu prezojn kaj kondiĉojn al

Belga Esperanto-Instituto, K. S.

11, Kleine Hôndstraat, Antverpeno

(poŝtĉekkonto 1689.58)

kiu disponas specialajn instalaĵojn por livero malmultekosta de ili. Ĝi bezonas nur klarajn fotografiaĵojn nigre-sur-blankajn.

Se vi ne konas tiujn poŝtkartojn, mendu specimenaron de 80 kartoj en ok serioj po dek kartoj, (tri serioj de Antverpeno, tri de Bruselo, unu de Bruĝo kaj unu de Kortrejko), kaj sendu tial 3 Belgojn al suprenomita adreso: preferu per poŝtceko aŭ poŝtmandato.

